

Hungara historio:

Hungara popola ribelo de oktobro/novembro 1956 kaj ĝia politika heredaĵo:

Hungario en 1956 kaj 60 jarojn poste

Ĉu Viktor Orbán celis uzurpi kaj misuzi la ideojn de 1956?

Neakceptebla misinterpretado de la historio fare de naciismaj radikaluloj kaj ´dekstraj´ demagogoj

De Andreas Künzli, Svislando

Per bildoj ilustrita versio povas esti mendita por privata uzo ĉe info@osteuropa.ch.

Mit Bildern illustrierte Version kann zum privaten Gebrauch bei info@osteuropa.ch bestellt werden.

Rákosi, Nagy, Hegedüs, Gerő, Kádár, Orbán

(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

„Oni mensogis tage kaj nokte, sur ĉiuj ondolongoj.“

Laŭ la hungara verkisto István Örkény pri la sinteno de la registara radio dum la hungara ribelo de 1956.

(El: György Dalos: 1956. 2006.)

„Pri neniu alia okazaĵo de la lastatempa historio oni tiel multe mensogis, neniun okazaĵon oni tiel tordis kaj makulis.“

(Leslie B. Bain, 1960.)

En oktobro 2016 Hungario renkontis la 60an datrevenon de la Popola Ribelo de 1956, kiu atingis sian kulminon en la 4a de novembro, la tago de la ĉefa atako de sovetiaj trupoj kontraŭ Hungario, por sufoki la revolucion. La ĉi-jara memortago okazis sub la politika aŭspicio de la EU-kritikema ĉefministro Viktor Orbán kaj ties hejma partio Fidesz, kun la protesto de la opozicio kaj sub la impreso de la krizo de rifuĝintoj en Eŭropo, kiu kaŭzis krizon en la rilatoj kun Budapeŝto. Post la starigo de bariloj ĉe la hungara landlimo por kontraŭstari la ondojn de rifuĝintoj el Proksima Oriento, precipe Sirio, kie furoras kruela milito, la provoka konstitucia referendumo de la 2a de oktobro kaj la puĉo kontraŭ la gazeto *Népszabadság*, la bruselaj funkciuloj ekstreme ĉagreniĝis pri Hungario, kie la kontraŭ-brusela retoriko de la hungaraj regantoj fariĝis pli kaj pli akra. En Okcidento la mirigita publiko reagis konfuzite kaj pasive. Nature, la gazetaro skribis kritike kaj negative pri Hungario, kio estas bedaŭrinda por lando, kiu multe suferis en sia historio kaj ludis heroan rolon dum la fina akto de la komunismo en 1989.

Historiaj kaj politikaj kondiĉoj

Ankoraŭ dum la konferencoj de la grandpotencoj, kiuj okazis antaŭ la militfino (Moskvo, Jalto), Stalin kaj Churchill interkonsentis pri la divido de orienta Eŭropo: Laŭ ilia volo, Hungario devis aparteni duone al la okcidenta, duone al la orienta influzono. Post la dua mondmilito, dum kiu Hungario fatale alianciĝis kun naci-socialisma Germanio, de kiu ĝi fine estis okupata, la lando estis pli kaj pli trafita de la influo de la komunisma partio kaj de Sovetunio, kies Ruĝa Armeo invadis ĝin en la 6a de septembro 1944. En la batalo de Budapeŝto, kiu havis stalingradecan dimension kaj daŭris de la 29a de oktobro 1944 ĝis la 13a de februaro 1945, parto de la urbo estis detruita, 160'000 homoj, germanaj, hungaraj kaj sovetiaj soldatoj

kaj kelkdek mil civiluloj mortis.¹ Krom tio, verŝajne 500-569'000 hungariaj judoj (laŭ Jad Vaŝem, la ekzakta nombro ne estas konata) estis deportitaj en la naziajn koncentrejojn de la „Tria Regno“, kie ili grandparte pereis.² La pactraktato kun Hungario, kiu ekvalidis en septembro 1947, sekurigis la „rajton de Sovetunio konservi laŭbezonan kvanton de trupoj en Hungario“, t.e. maksimume 65'000 soldatojn plus 90 aviadilojn kun 5000 anoj de akompana personaro. En aprilo 1948 ekvalidis traktato inter Sovetunio kaj Hungario pri „amikeco, kunlaboro kaj reciproka helpo“. Kvankam Hungario devis ricevi demokratian politikan strukturon kaj nekomunismaj fortoj gajnis la unuajn balotojn, la evoluo iris en alia direkto. Post kiam la nekomunismaj politikaj partioj estis forpuŝitaj, iliaj estroj arestitaj aŭ fuĝintaj eksterlanden, restis la komunisma partio, kiu venkis en la parlamentaj balotoj de la 15a de majo 1949 kaj akaparis la politikan povon en la lando. En aŭgusto de tiu jaro Hungario ricevis konstitucion laŭ sovetia modelo. Do, Hungario renaskiĝis kiel komunisma „Popola Respubliko“ en la limoj antaŭviditaj de la Traktato de Trianon, kio signifis, ke ĝi fariĝis ŝatellita ŝtato de Sovetunio kun ege reduktita teritorio, ĉar pri la najbaraj regionoj, kiujn Horthy povis aneksi dum la milito, ĝi devis denove rezigni. Hungario, iama fiera imperio en Eŭropo, do perdis la militon en ĉiuj rilatoj, kvankam la lando volis eviti ĝin kun la celo restarigi sian iaman grandecon. Krom digesti la pezan heredaĵon de la Habsburga monarkiismo kaj de la dekstra diktaturo de la Horthy-tempo, en mallonga historia periodo Hungario devis nun lukti ankaŭ kontraŭ la maldekstra stalinisma diktaturo de Rákosi, kies viktimo la hungaroj neeviteble fariĝis.

Mátyás Rákosi (kiu iam nomiĝis Rosenfeld³), membro de la iama komunisma registaro de Béla Kun, poste funkciulo de Komintern en Moskvo, fariĝis nova reganto de Hungario, kie li devis starigi reĝimon laŭ stalinisma modelo. La konstruado de tiu nova reĝimo estis akompanata de grandskalaj purigoj kaj reprezalioj, de kiuj estis trafita ĉirkaŭ unu miliono da hungaroj, kio egalas al dek procentoj de la loĝantaro. Lige kun „malkovrita titoisma konspiro“ (1948/49) dekmiloj da homoj, inter ili amaso da membroj de la komunisma partio mem, estis arestitaj, akuzitaj kaj kondamnitaj en dubindaj tribunalaj procesoj kaj malaperis en prizonoj kaj labortendaroj por longa tempo. Simbola kulmino de tiu kampanjo estis la akuzado kaj mortkondamno de *László Rajk*, populara komunisto kaj ministro, kiu mem furoris kiel fanatika stalinisto, kiu partoprenis en la disbatado de la burĝaj partioj kaj aranĝis diversajn farsprocesojn kontraŭ politikaj kontraŭuloj.⁴ Inter 1948 kaj 1951 entute ĉirkaŭ 400 mil homoj perdis sian membrecon en la komunisma partio. Krom amaso de „rajkistoj“, Rákosi ordonis malliberigi 225 katolikajn ekleziulojn, inter kiuj la plej eminenta estis kardinalo József Mindszenty. La stalinisma teroro de Rákosi, kiu mem praktikis kulton de persono, nomante sin „plej bona hungara lernanto de Stalin“, dum la hungaroj primokis lin kiel „terpoman kapon“, atingis sian kulminon en la jaroj 1951-2. Preskaŭ triono de hungaraj familioj estis koncernataj de reprezalioj. La nigra humuro diris, ke la hungara popolo estis dividita laŭ du partoj: tiuj, kiuj jam estis en la malliberejo, kaj tiuj, kiuj ankoraŭ estos senditaj tien.

Kiam Stalin forpasis en marto 1953, finiĝis ankaŭ la monopola potenco de Rákosi, kiu estis kaj ĉefministro kaj ĝenerala sekretario de la hungara KP, almenaŭ provizore. En Sovetunio *Nikita Ĥruŝĉov*⁵ akaparis la povon kaj enkondukis kontraŭ-stalinisman kurson. Tio havis ankaŭ sekvojn por Hungario, kiu devis sekvi la linion de Moskvo: Rákosi estis senpotencigita kiel ĉefministro kaj anstataŭigita per *Imre Nagy*, ĝisnuna ministro pri agrikulturo, iama ministro pri internaj aferoj kaj iama parlamentestro.⁶ Nagy, kiu inter 1929 kaj 1944 vivis en Sovetunio, kie li okupiĝis pri agrikultura esplorado, ŝajnis al la sovetianoj esti akceptebla alternativo. Ĉar en 1949 li kontraŭstaris la kolektivigon de la agrikulturo, Nagy dume perdis siajn oficojn, sed jam du jarojn poste li estis rehabilitita kaj reakceptita de la politburoo kaj registaro kaj povis daŭrigi sian reforman laboron en la ekonomio. En sensacia parolado de la 27a de junio 1953, kiu restis ekstere nekonata, Nagy kritikis la kvaropon Rákosi-Gerő-Farkas-Révai (cetere, ili ĉiuj estis judoj) pro lezado de leĝoj kaj fuŝa politiko. Rákosi formale konfesis siajn erarojn por savi sian haŭton. En dua ne malpli miriga parolado de la 4a de julio 1953 Nagy

¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Siege_of_Budapest aŭ la ĉi-rilatan studon de Krisztián Ungváry.

² Vd. <http://www.yadvashem.org/yv/de/holocaust/about/09/hungary.asp> aŭ la ĉi-rilatan studon de László Varga.

³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Mátyás_Rákosi.

⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/László_Rajk.

⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Nikita_Ĥruŝĉov.

⁶ Vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Imre_Nagy_\(politikisto\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Imre_Nagy_(politikisto)). La membraron de la unua registaro de Imre Nagy vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Unua_Kabineto_Imre_Nagy.

anoncis antaŭ la parlamento, ke li intencas ĉesigi la polican arbitron, fermi la koncentrejojn por politikaj kontraŭuloj, proklami amnestion kaj rezigni pri la deviga kolektivigo de la agrikulturo. Li ne nur efektivigis tiujn promesojn, sed sukcesis ankaŭ plibonigi la vivon de la laboristoj kaj kamparanoj, malakcelante la ekspansion de la pezindustrio kaj la devigan kolektivigon, kaj ĉesigis la persekutadon de la „kulakoj“. La hungara popolo, kiu dankis tiujn klopodojn al li, rekomencis esperi kaj pli libere spiri. Nagy estis konsiderata kiel kuraĝa, kapabla kaj honesta persono kun homecaj kvalitoj, kvankam li estis malbona politikisto. Post la laborista ribelo, kiu eksplodis en GDR la 17an de junio 1953 kaj kiu estis brutale sufokita de sovetiaj trupoj, Moskvo bremsis la tutan reforman procezon, kiu ŝajnis iri tro rapide. En tiu momento de la politika reakcio Rákosi profitis la okazon kaj venĝis sian rivalon Nagy, kio denove limigis la spacon por la reformemulo, kiu devis elteni malagrablan lukton de konkurenco kun la frakcio de Rákosi, kiu celis konservi la povon en la partia aparato kaj la sekureca servo. Kvankam Nagy restis izolita en la partiaj strukturoj, li almenaŭ restis populara ĉe la hungara publiko. Fakte, Nagy, la trankvila, racia, iom seka profesoreca funkciulo, ne volis aboli, sed korekti kaj plibonigi la socialismon, kiu devis fariĝi socie pli humana, politike pli demokratia kaj ekonomie pli efika, do ĝenerale pli akceptebla. Sed ne ĉio dependis de Nagy kaj ne ĉio iris glate por li. La sama Centra Komitato, kiu en oktobro 1954 ankoraŭ aprobis lian reformkurson, en marto 1955 subite ŝanĝis sian vidpunkton kaj deklaris lin dekstra herezulo, krude eksoficigis lin kiel ĉefministron kaj eĉ eksigis lin, kvazaŭ li estus pario, kiu perdis la honoron, ankaŭ el la partio mem. La „Nova Kurso“ de la reformuloj devis fiaski, ĉar la partiaj ideologoj deklaris ĝin „kontraŭ-marxisma, kontraŭ-leninisma kaj kontraŭ-partia“. En la sekvo okazis senkompata persekutado de amikoj kaj kunlaborintoj de Nagy, kiuj estis maldungitaj aŭ alimaniere forigitaj kaj ĉikanitaj.

1956

Nova hungara ĉefministro dume fariĝis *András Hegedüs*, aliancano de Rákosi kaj Gerő. La popolo, precipe la junularo, estis seniluziigita pri tiuj kapricaj politikaj manovroj kaj komencis postuli la rehabilitadon kaj revenigon de Imre Nagy. Kiam Ĥruŝĉov en februaro 1956 okaze de la 20a partia kongreso prezentis sian legendecan sekretan paroladon kontraŭ la personkulto de Stalin, denove blovis ankaŭ alia vento por Rákosi, kiu estis devigita demisii la 18an de julio kiel ĝenerala sekretario de la hungara KP. Sed ankaŭ lia posteulo *Ernő Gerő* estis same malŝatata de la popolo, tiel ke la politika situacio en Hungario fariĝis pli kaj pli malkontentiga. La anstataŭigo de Nagy per Hegedüs kaj de Rákosi per Gerő solvis nenium problemon, sed nur akrigis la krizon de la hungara politiko. Tamen, almenaŭ la gazetaro fariĝis libera kaj tabuaj temoj povis esti trakataj. Pli kaj pli la gvidantoj de la hungara KP konstatis kun angoro la kreskantan influon de la opozicio kaj civilsociaj amasmovadoj en la gazetaro kaj radio, kiu estis sentebla en la tuta publika vivo. Gerő kaj Rákosi denunciis tiujn grupojn en Moskvo kiel „kontraŭ-revoluciajn antisovetiajn fortojn“.

La 6an de oktobro 1956 László Rajk, la ĉefa, plej prominenta viktimo de la Rákosi-reĝimo, estis deklarita senkulpa, rehonorigita kaj solene reenterigita. Centmiloj da partoprenantoj vidis en tiu simbola akto la komencon de la entombigo de la stalinisma tiranio mem. Post kiam Nagy formale konfesis siajn ideologiajn-politikajn „erarojn“, sed insistis malakcepti la akuzojn kontraŭ li, la 13an de oktobro li estis reakceptita de la partio kaj povis daŭrigi la komencitan laboron, kun fatalaj sekvoj.

Kune kun la politika subpremado la ekonomio en Hungario draste malboniĝis, malgraŭ akcelata industriigo, kiu fizike elĉerpis la laborfortojn. Do, la hungara socio de la jaro 1956 estis ekstreme frustrita socio, en kies kolektiva memoro la perditaj militoj kaj naciaj humiligoj ankoraŭ ne estis digestitaj kaj fortiĝis la konscio, ke anstataŭ socia justeco establiĝis brutala polica ŝtato laŭ sovetia tipo. La rapide progresanta sovetiigo kaj rusigo de la vivo, inkluzive la instruado de la rusa lingvo, kiu minacis la ekziston de la hungara nacio, devis esti haltigita. Budapeŝto estis devigita subskribi kontraktojn kun Sovetunio, kiuj estis malfavoraj al Hungario. En hungaraj oreloj la vorto „komunismo“ sonis malbone, sed pri la socialismo oni ankoraŭ havis certajn esperojn (Dalos).

Tiaj ege malfavoraj antaŭkondiĉoj maturigis la politikan, ekonomian, socian kaj psikan krizojn kaj faris, ke la hungara popola revolucio de 1956 povis esti preparata, ĝermi kaj eksplodi. En Hungario

la malkontenteco kreskis precipe inter intelektuloj, verkistoj kaj studentoj, kiuj unue eĉ ne havis esence politikajn postulojn, sed dezirojn por praktike plibonigi la labor- kaj vivkondiĉojn. En tio la hungaraj universitatoj evoluis kiel centroj de la kritika diskuto kaj de la protesto. Gravan rolon en tiuj debatoj, kiuj okazis ne nur en la ĉefurbo, ludis ankaŭ la fama „Petőfi-cirklo“, en kiu la intelektuloj, komence kun tolerado de la partio, kritike traktis la historion. Ĝiaj kunvenoj altiris ne malgrandan publikon. Neakceptebla por tiuj homoj estis la kruda enmiksiĝo de la ŝtato kaj partio en la kulturan vivon, kiu kondukis inter alie al cenzuraj ĉikanoj kontraŭ la literatura bulteno *Irodalmi Újság*. La 20an de oktobro, 3000 studentoj de la universitato en Szeged proklamis sian ekziĝon el la komunisma junulara asocio kaj fondis propran demokratian studentan organizaĵon.

Kiel eventuala alternativa modelo por reformoj kadre de la socialismo, kiun la hungaroj tamen volis konservi, servis titoisma Jugoslavio. Tiucele, en oktobro pluraj membroj de la hungara politburoo, inter ili Gerő, Kádár kaj Hegedüs, veturis al Beogrado por diskuti kun la jugoslaviaj kamaradoj pri la estonteco de la socialismo, kiu evidente estis en danĝero. Ĉe Tito ili verve klopodis misfamigi la politikon de Nagy kaj avertis pri la altgrada danĝereco de lia kurso.

Evoluo de la hungara ribelo

La 22an de oktobro, studentoj de la Teknika Universitato en Budapeŝto prezentis *manifeston kun 16 punktoj* por postuli la senprokrastan foriron de la Ruĝa Armeo el Hungario, elekton de novaj gvidantoj de la hungara KP, transformadon de la registaro sub la gvidado de Imre Nagy, eksoficigon de kaj juran proceson por ĉiuj krimaj gvidantoj de la Stalin-Rákosi-erao, okazigon de liberaj balotoj kun la partopreno de diversaj politikaj partioj, reekzamenadon de la hungar-sovietiaj rilatoj, de la internaciaj kontraktoj kaj reparaĵaj pagoj. Postulataj estis ankaŭ la reorganizado de la tuta ekonomia vivo en Hungario, reviziado de la normoj en la industrio kaj refiksado de la salajroj por laboristoj kun enkonduko de minimumaj salajroj kaj pli justa traktado de la kamparanoj, la senprokrasta liberigo de senkulpaj malliberuloj, plena libereco de la opinio, parolado kaj gazetaro. Al la 16 punktoj de la manifesto apartenis ankaŭ la postuloj elimini la Stalin-statuon en Budapeŝto kaj ĝia anstataŭigon per monumento por la batalantoj de 1848/49, reenkondukon de la malnova hungara emblemo sur la flago, de la 15a de marto kaj 6a de oktobro kiel oficialaj festotagoj kaj de novaj uniformoj por la hungara armeo. Precipe la postulo de la foriro de la sovetia armeo, kiu ĝis nun estis severa tabuo, estis tre kuraĝa paŝo, ĉar tio rekte trafis la nervon de la sovetianoj kaj komunistoj, kies potenco estis bazita sur sovetiaj armiloj.

Poste, ankaŭ la prezidioj de la sindikatoj kaj de la verkista asocio faros en propraj manifestoj praktike la samajn postulojn. La „Alvoko de la Revolucia Komitato de la Hungaraj Intelektuloj“, kiu estis subskribita de naŭ gravaj landaj organizaĵoj de studentoj, verkistoj, ĵurnalistoj, artistoj, muzikistoj, universitataj profesoroj, altlernejoj kaj de la Petőfi-Klubo, enhavis kongruajn postulojn en komparo kun la aliaj manifestoj.

La 23an de oktobro 1956, en Budapeŝto manifestaciojn kaj protest-marŝojn partoprenis jam dekmiloj da ĉefurbanoj, laboristoj, virinoj. Dum unua grupo marŝis ĝis la Sándor-Petőfi-monumento, kie aktoro Imre Sinkovits recitis revolucionan poemon, alia amaso promenis ĝis la Józef-Bem-placo, kie la prezidanto de la verkista asocio faris paroladon. Oni emfazis solidarecon kun Pollando, kie bolis similaj protestoj kaj kie la gvida sed kontestata „nacia komunisto“ Władysław Gomułka revenis al la pinto de sia partio. La revolucia fajrero saltis de Pollando al Hungario – ambaŭ landojn ligis longa tradicio de amikaj rilatoj kaj naciliberigaj ribeloj, dum la rusa armeo estis konsiderata kiel malamiko jam de jarcentoj. En pluraj polaj urboj okazis amasaj manifestacioj apoge al Hungario. Sed Gomułka, kiu preferis apogi la politikon de Moskvo, finfine seniluziigis la liberecamajn popolojn de Pollando kaj orienta Eŭropo.

La manifestacianta amaso marŝadis tra la urbo kaj trans la danubaj pontoj, svingante hungarajn kaj polajn flagojn, kriante sloganojn kaj kantante la nacian himnon. La kvartalaj loĝantoj varme salutis ĝin el la fenestroj. El la hungaraj flagoj estis eltranĉita la malŝatata sovetia simbolo. Videblis sloganoj kiel „Sufiĉas Rákosi! Ni bezonas novan partian gvidanton! La partio gvidu nin! For la arbitron! For la

stalinismon! Vivu la leĝo! Hungara-sovetia amikeco! Imre Nagy en la registaron! Ĉesigu la trompadon kaj la misekonomion, ni postulas novan ekonomion! Egalecon, liberecon! Rusoj, iru hejmen“ ktp. Rimarkinde estas, ke al tiuj protest-marŝantoj aliĝis ĉirkaŭ 800 anoj de la kadeta akademio „Petőfi“, inter kiuj troviĝis privilegiitaj filoj de altrangaj registaranoj kaj partianoj kaj ÁVO-oficiroj.

Vespere, la homoj, ĉirkaŭ 200 mil, kolektiĝis antaŭ la parlamentejo, kie la amaso senpacience atendadis la sinprezenton de la ‘mesio’ Imre Nagy, por ke li alparolu la homojn. Fakte, post iom da tempo, kiu jam preskaŭ elĉerpis la paciencon de la atendantoj, Nagy aperis sur la balkono de la parlamentejo, kiel la papo en Vatikano por doni ĝeneralan aŭdiencon, kaj diris kelkajn sekajn vortojn ĉefe por admoni la homojn, kiujn li alpaolis per „kamaradoj“, kio kaŭzis akran laŭtan reagon, ke ili iru hejmen. Sed la plimulto restis kaj bruligis siajn gazetojn, kiuj transformiĝis al torĉoj, ĉar oni elŝaltis la lumon sur la placo.

Anstataŭ laŭtleĝi la studentan manifeston kun la 16 postuloj, la radio dissendis tedan prelegon de Ernő Gerő, kiu parolis kiel tipa komunisma politikisto, kiu laŭdis la „atingojn de la socialismo“ kaj konfirmis „la eternan amikecon kun Sovetunio“, elpuŝante krudajn minacojn kontraŭ la manifestaciintoj, al kiuj li riproĉis, ke ili „misuzas la demonstraciojn por naciismaj celoj“ kaj simile. Tiajn provokojn la hungaroj ne plu eltenis.

Sur la Felvonulási-placo furioza homamaso faligis la Stalin-monumenton kaj trenis la pezegan statuon antaŭ la parlamentejon. La ÁVO-polico, kiu staris en la ĉirkaŭaĵo, restis pasiva. Aŭdiĝis krioj kiel „rusoj for, iru hejmen!“

Fonto: [https://de.wikipedia.org/wiki/Stalin-Denkmal_\(Budapest\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Stalin-Denkmal_(Budapest))

Sufiĉe granda homamaso kolektiĝis ankaŭ en la mallarĝa strato de la konstruaĵo de Radio Budapeŝto. La vokitaj hungaraj soldatoj (kiuj ne estis armitaj), kiuj devis bloki la vojojn, solidariĝis kun la protestantoj. La venontajn horojn, grupo de protestantoj postulis laŭtleĝi la manifeston en la radio, sed la cenzuro rifuzis ĝin. La protestantoj sendis delegacion en la konstruaĵon, kiu devis trakti la postulon kun la direktoro. Kiam la delegacio ne revenis, la homoj kredis, ke unu el la delegacianoj estis mortpafita. Nokte je la dekunua horo, la konstruaĵo de la radio estis atakita per malpezaj armiloj. El la fenestroj de la konstruaĵo oni disŝprucis unue akvon, poste larmgason, kaj anoj de ÁVO, la fifama hungara sekreta polico, komencis pafi kontraŭ la homoj, kun mortigaj sekvoj por kelkaj ĉeestantoj. Inter la mortintoj troviĝis ankaŭ ÁVO-membroj. La radio raportis pri pafado en la urbo. Alproksimiĝis armea taĉmento, kiu estis akompanata de tankoj, por forpeli la amason, sed sen perforto. Krom tio, homoj enpenetris vendejojn, kie estis rusaj libroj, kaj ĵetis ilin sur la straton kaj bruligis ilin. Frumatene, iuj manifestaciintoj sturmis la konstruaĵon de la radio, sed povis esti forpelitaj de sekurecaj servistoj. Krom tio, la revoluciuloj okupis policejojn kaj partiajn oficejojn, kie ili trovis armilojn. Aliaj protestantoj iris al la konstruaĵo de la partia gazeto *Szabad Nép* por postuli la publikigon de la 16 punktoj. ÁVO-gardistoj pafis kontraŭ la amaso, kiu ne estis armita, kaj mortigis kelkajn el la homoj. Fine, la protestantoj akaparis la domon post kiam ili ricevis armilojn (de laboristoj el Csepel, Újpest kaj aliaj kvartaloj).

Samtempe, ankaŭ en aliaj lokoj de Hungario la revolucio bolis: En Debreceno manifestaciis 30 mil homoj, ĉefe studentoj kaj laboristoj; tri studentoj estis mortpafitaj de sekurecaj fortoj, kiam ili ĵetis ŝtonojn.

La sovetianoj reagis nerveze. *Jurij Andropov*, la sovetia ambasadoro en Budapeŝto,⁷ raportis al Moskvo laŭsence, ke „la hungaraj kamaradoj bezonos nian helpon“, kio signifis, ke la decido perforte interveni en Hungario por sufoki la ribelon jam estis prenita de la sovetiaj regantoj, ĉar Moskvo sentis, ke ĝia potenco en Hungario estas en danĝero. Do, la „operaco ondo“, kiel la unua atako de sovetiaj trupoj kontraŭ Hungario de la 24a de oktobro estis nomita, povis komenciĝi.

⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Jurij_Andropov.

Unua sovetia atako kaj la sekvoj

La peto de la hungaraj komunistoj (Ernő Gerő) al Moskvo interveni per trupoj estis do pura formalajo, kiun la budapeŝtaj marionetoj de la moskvaj regantoj devis plenumi, ĉar la operaco jam estis decidita de la sovetianoj. Kaj vidu, en la nokto de la 24a de oktobro kontraŭ Budapeŝto moviĝis unuaj sovetiaj tankoj, kiuj estis lokitaj en Hungario mem. Unua parto de tankoj venis de la sudokcidenta flanko el Székesfehérvár, dua parto de la sudorienta direkto el Cegléd. Ŝajnas, ke aldonaj tankoj kaj trupoj estis menditaj ankaŭ rekte en Sovetunio kaj Rumanio. Antaŭ la ribelo en Hungario troviĝis la 2a kaj 17a motor-divizioj de la sovetia armeo kun trupoj kaj personaro de 20'000 personoj kaj 600 tankoj. En la mirinde rapida operaco partoprenis 6000 soldatoj, kiuj estis akompanataj de 290 tankoj kaj 129 tanksimilaj veturiloj. La tankoj paradis tra la urbocentro de Budapeŝto kaj pafadis ankaŭ kontraŭ nearmitaj homoj, kio nature ege ŝokis kaj kolerigis la hungarojn. La sovetianoj ŝajne kredis, ke ili sufokos la hungaran ribelon same rapide kaj efike kiel en GDR en junio 1953, kiam tie eksplodis laborista ribelo kontraŭ la stalinisma reĝimo. Sed ili eraris, ĉar ili subtaksis la firman, obstinan kontraŭstaron de la popolo en Hungario, precipe en Budapeŝto, sed ankaŭ en aliaj lokoj.

La hungara armeo mem havis provizon de entute 250 mil soldatoj (kun 500 aviadiloj), de kiuj troviĝis en tiu momento 4500 kun 65 tankoj en Budapeŝto. Je ĝia dispono krome estis 2500 armitaj fortoj de milicaj trupoj, kiuj estis submetitaj al la ministerio de la internaj aferoj. Sed en tiu konflikto la hungara armeo restis grandparte pasiva, do ne batalis kontraŭ la sovetiaj trupoj nek kontraŭ hungaraj civiluloj, kaj ankaŭ flanke de la budapeŝta polico ekagis nur relative malmultaj anoj, de kiuj kelkaj eĉ aliĝis al la ribelo.

En la nokto de la 24a parto de la membraro de la Centra Komitato de la hungara KP ankoraŭ kunvenis en Budapeŝto por solvi la demandon de la politika povo. Imre Nagy estis reinstalita kiel ĉefministro, evidente kontraŭ lia volo, kaj kvazaŭ por misuzi lin kiel urĝan brigadiston por estingi la fajron de la revolucio, kiel trafe supozis György Dalos.⁸ Sed li ne povis labori en la oficejo de la ĉefministro en la parlamentejo, ĉar li estis retenata en la domo de la komunisma partio. Al lia registaro apartenis *Ernő Gerő, János Kádár, Géza Losonczy, Zoltán Tildy, Ferenc Münnich, Ferenc Erdei, Béla Kovács, Antal Apró, Imre Horváth, Károly Janza*, filozofo *György Lukács*, por nomi la plej konatajn.⁹ Dum la Rákosi-tempo tiuj politikistoj, kiuj reprezentis diversajn partiojn, spertis reprezaliojn. Ministroj Piros (internaj aferoj), Bata (defendo), Darvas (propagando) kaj Hegedüs perdis siajn postenojn. Speciala komitato gvidata de la anstataŭanta ĉefministro Antal Apró ricevis la taskon kunordigi la armeajn rimedojn por sufoki la ribelon.

Kiel centro de la rezisto fariĝis la fama Korvina trapasejo, kie troviĝis kinejo kaj kiu aparte taŭgis por defendi sin kontraŭ sovetiaj tankoj, ĉar tiaj ne povis eniri la trapasejon. Aliaj epicentroj fariĝis la Kilián-kazernoj ĉe la Ŭllői-strato (kie loĝis Paul Lendvai), la Széna-placo, la Köztársaság-placo, la Tűzoltó-strato, la Baross-placo, la placo antaŭ la Orienta stacidomo kaj aliaj lokoj. Flanke de la ribeluloj kaj batalantoj la nombro kreskis de tago al tago: el komence 70-80 fariĝis 800 kaj 1000, poste 4000, distribuitaj en grupoj dise tra la urbo.

Frumatene, Nagy proklamis en la radio la militan staton en la tuta lando, kiu enhavis ankaŭ malpermeson de kunvenado, parolis pri „kontraŭ-revolucio“, postulis de la ribeluloj demeti la armilojn kaj klarigis, ke la registaro petis sovetiajn trupojn por helpi la sufokadon de la ribelo. Multaj homoj, kiuj fidis kaj kredis lin, ne komprenis lian sintenon kaj estis konfuzitaj kaj seniluziigitaj, ĉar ili ne komprenis je kiu flanko Nagy nun vere staris kaj pensis, ke li aliĝis al la flanko de la subpremantoj. Estas klare, ke Nagy, kiu *ne* vokis la sovetiajn trupojn, staris sub enorma premo, kiun li apenaŭ eltenis, des pli ke regis granda perturbo pri la demando kiel la hungara registaro, kiu estis ekstreme konsternita, reagu al tiu sovetia agreso kaj al la ribelo entute.

⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/György_Dalos.

⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Dua_Kabineto_Imre_Nagy.

La sekreta raporto de Mikojan kaj Suslov,¹⁰ kiuj aperis en la hungara ĉefurbo kune kun la fifama KGB-ĉefo Serov,¹¹ bagateligis la okazaĵojn, kaj en la frua mateno de la tago de la sovetia agreso la konsilio de ministroj laŭtlegis en la radio komunikon por sciigi al la mondo, ke „faŝismaj reakciaj elementoj komencis armitan atakon kontraŭ niaj publikaj konstruaĵoj kaj kontraŭ nia polico“. Poste el faŝistoj fariĝis „kontraŭ-revoluciaj bandoj“, sed kiel ajn, oni certigis, ke la „kontraŭ-revolucia puĉprovo“ estis likvidita.

Scenoj dum la unua fazo (Fonto: Vikipedio); Korvina trapasejo; Gergely Pongrácz

Sed kiuj estis tiuj ribeluloj de la unuaj horoj kaj tagoj de la ribelo? Kelkaj hungaraj historiistoj skribis, ke la ribelo estis ekzakte planata. Sed la vero estas, ke tiu ribelo, aŭ batalo por la libereco, spontane eksplodis kaj formiĝis, kaj ĝi ne havis planintojn nek centran gvidant(ar)on kaj okazis kvazaŭ anarkie sur diversaj stratoj kaj placoj de Budapeŝto.¹² La granda plimulto de la batalantoj estis tre junaj, 15-20-jaraj, simplaj homoj, ne intelektuloj; oni vidis eĉ infanojn kaj virinojn ĵeti tra domfenestroj benzinajn botelojn, tiel nomatajn „Molotov-koktelojn“, kontraŭ sovetiaj tankoj, kiuj eksplodis kaj forbrulis. La memelektitaj komandantoj de tiuj ribelantaj grupoj nomiĝis *László Iván Kovács*, *Gergely Pongrácz*, kiu batalis kun siaj fratoj, *Per Olaf Csongovai* kaj *István Angyal*. Ĉi tiuj iom 'sovaĝaj' kaj aventuremaj batalantoj, kiuj originis de socie marĝenaj subtavoloj de moderna grandurbo kaj kiuj donis al la 'anonima' surstrata batalo konkretan homan identecon, eble estis kompareblaj kun politikaj anarkiistoj; ĉiu el ili estis siaspeca individuo kun propra ideo aŭ plano: Kovács celis aboli la komunismon, Csongovai intencis starigi laboristan konsilion, Pongrácz, armendevena brutbredisto el Cegléd, kiu originis el Transilvanio, volis venki la sistemon per milita perforto.¹³ La ribeluloj do konsistis el heterogena amaso de „kontraŭ-revoluciaj“ fortoj kaj elementoj, inter kiuj bedaŭrinde troviĝis ankaŭ ordinaraj krimuloj, dekstremaj radikaluloj kaj iamaj oficiroj de la Horthy-ŝtato. Do, por povi diri, kiuj ekzakte estis tiuj homoj kaj grupoj, necesus bone koni iliajn biografiojn, ideologiojn kaj intencojn. Kvankam neniel eblas kondamni la hungaran ribelon kiel batalon de faŝistoj, oni povas diri, ke multaj el tiuj ribeluloj celis la abolon de la socialismo. En tio ili havis almenaŭ certan moralan apogon de kontraŭ-komunismaj fortoj kaj granda parto de la civila publiko en Okcidento. Tiun logikon oni ne povas kontesti.

La unua kunpuŝiĝo de hungaraj surstrataj batalantoj kun sovetiaj trupoj kostis altan prezon: Laŭ la oficiala statistiko, en la du unuaj tagoj pereis 250 homoj sur la stratoj de Budapeŝto.

La 25an de oktobro la konflikto atingis novan kulminon: Antaŭ la budapeŝta parlamentejo kolektiĝis 8-10'000 civilaj manifestaciantoj. Iuj el ili eĉ 'amike' renkontiĝis kun sovetiaj soldatoj kaj ŝovis hungarajn flagojn en la tubojn de la kanonoj de iliaj tankoj. Subite aŭdiĝis pafado de la tegmentoj de najbaraj domoj; malgraŭ nekonata origino probable denove pafis anoj de la hungara sekureca servo ÁVH aŭ sovetiaj KGB-anoj mem. La sovetiaj tankoj, kiuj staris sur la placo de la parlamentejo por protekti ĝin, sentis sin atakitaj kaj komencis mem pafadi per kanonoj aŭ mitraloj kontraŭ la homamaso. Laŭ sovetiaj indikoj en tiu masakro mortis 60, laŭ aliaj kalkuloj inter 75 kaj 200 civiluloj kaj vundiĝis 284 personoj. En tiuj minutoj pereis ankaŭ *Zoltán I. Tóth*, la lezita dekano de la historia fakultato, kiu volis transdoni peticion de siaj studentoj al la registaro, kiu kunsidis en la parlamentejo. La tago, kiu estis nomata „nigra ĵaŭdo“, eĉ fortigis la koleron de la hungaroj kontraŭ la sovetiaj okupantoj, kaj tiel la ribelo trovis sian dinamikan daŭrigon.

¹⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Anastas_Mikoyan kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Mikhail_Suslov.

¹¹ Armegeneralo Serov, ĉefo de KGB, kiu vizitis la Hungarion inkognite kiel konsilisto, havis ekstreme malbonan reputacion en Okcidento, ĉar li estis konata kiel iama anstataŭanto de NKVD-ĉefo Berija, kiu partoprenis en praktike ĉiuj eblaj sangavidaj krimoj, subpremoj kaj persekutoj de la stalinisma teroro. Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ivan_Serov.

¹² Laŭ Gyurkó, p. 134, ekzistis en Hungario agentoj de eksterlanda sekurecaj servoj kun klaraj instrukcioj, kaj ekzistis malpermesitaj organizaĵoj, kiuj planis puĉon. Sed ili ne povis esti efikaj sen la partopreno de la amaso, kiu publike manifestaciis kaj protestis.

¹³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Gergely_Pongrácz kaj <http://pongraz.ewk.hu/gergo-es-odon>.

La 25an komenciĝis ankaŭ la 'fama historio' de kolonelo *Pál Maléter*, kiu komandis hungaran tankan taĉmenton; li estis sendita al Budapeŝto por kontraŭbatali la ribelon, sed subite li transiris al la flanko de la ribeluloj kvazaŭ hazarde. En la tria registaro de Imre Nagy Maléter fariĝis ministro pri defendo, kun fatalaj sekvoj por la kolonelo. Precipe en eksterlando li estis perceptata kiel dua ĉefa heroo (kaj viktimo) de la hungara ribelo apud Imre Nagy.

En la sekvaj tagoj la ribelo disvastiĝis tra tuta Hungario. En kvindeko da hungaraj urboj okazis armitaj kunpuŝiĝoj kun soldatoj de la sovetia kaj hungara armeoj kaj kun la hungara sekureca servo ÁVO. Manifestaciantoj mortis en Kecskemét kaj Mosonmagyaróvár, kie 101 homoj estis mortigitaj kaj 150 vunditaj de ÁVO-fortoj, kiuj pafis kontraŭ la amaso. Similaj incidentoj kun ÁVO okazis ankaŭ en Győr, Jászberén, Miskolc, Sopron, Szeged kaj Veszprém. En Dunapentele, la iama Sztálinváros (nun Donaújváros), kiu estis industria urbo, anoj de ÁVO pafis kontraŭ aro de protestantoj, mortigis 8 kaj vundis 26 personojn.

Laŭ tiama oficiala klarigo de Kádár, kiu reprezentis la oficialan perfektecon, „la demonstracio de parto de nia junularo, kiu komenciĝis pace kaj en konsento kun granda plimulto de la partoprenantoj, transformiĝis post malmultaj horoj kaj laŭ la intenco de kontraŭ-popolaj kontraŭ-revoluciaj elementoj, kiuj aliĝis al ili, al armita atako kontraŭ la popoldemokratia popolpotenco“. Kaj li postulis, ke la ribelo devos esti „kontraŭ-batalata“.

Kvankam ambaŭ parolis pri „kontraŭ-revolucio“, ekzistis klaraj principaj kontraŭdiroj en la percepto kaj sinteno de Nagy kaj Kádár, kiu tiam komencis ludi gravan rolon.

En la klopodo iel solvi la embarasan kaj danĝeran situacion kaj trankviligi la furiozajn ribelantojn, Nagy anoncis en la hungara radio, ke la ribelo ne estos konsiderata kiel kontraŭ-revolucio, sed ke ĝi estas agnoskita de la registaro kiel „granda, nacia kaj demokratia movado“. Krome, li promesis armisticon kaj amnestion por la partoprenantoj en la ribelo kaj intertraktojn kun ili, likvidon de la ŝtata sekureca servo, starigon de nacia gvardio, kaj certigis, ke li igos la sovetian armeon senprokraste forlasi Budapeŝton kaj Hungarion. Grandparto de la 16 punktoj do ŝajnis esti plenumita kaj la revolucio gajnita, kvankam oni ankoraŭ ne parolis pri plurpartia politika sistemo kaj sekretaj liberaj balotoj. Per tio Nagy ricevis pli da libera spaco por agi. Sed la anoncado de tiuj intencoj ne sufiĉis por kontentigi la ribelulojn. En la tuta lando okazis amasaj manifestacioj antaŭ la konstruaĵoj, kiuj estis konsiderataj kiel simboloj de la ŝtata subpremado. Formiĝis laboristaj, revoluciaj kaj naciaj konsilioj, kiuj transprenis la politikan povon kaj anstataŭis la partiajn strukturojn. Eĉ estis farita la propono, ke tiuj konsilioj anstataŭu la nacian parlamenton kaj havu kompetencojn de la ŝtatestro, sed tiu propono ne efektiviĝis. La 28an de oktobro la partia gazeto *Szabad Nép* laŭdis tiujn konsiliojn kiel verajn instancojn de la popola (laborista) demokratio. La konsilioj fakte konsistis el ĉiuj popolaj tavoloj. Ekzemple la konsilio de Debrecen, kiu havis cent membrojn, konsistis el 60% laboristoj, 20% universitataj studentoj kaj 20% armeanoj. En la konsilioj de Győr, Eger kaj Jászberény ekzistis ankaŭ kamparanoj. Iuj budapeŝtaj konsilioj, konsistantaj averaĝe el 20-25 personoj, havis laboristojn, studentojn, policistojn, metiistojn, intelektulojn, soldatojn, komercistojn kaj publikigis siajn opiniojn en la gazeto *Esti Hírlap*, kiu aperis ĝis la 3a de novembro. Iuj konsilioj akceptis ankaŭ komunistojn, aliaj preferis agadi sen ili. Al la ĉefaj taskoj de la konsilioj apartenis restarigi la publikan ordon kaj nacian gvardion, reorganizadi la publikan administradon laŭ demokratiaj kriterioj, provizadi malsanulejojn per gravaj varoj kaj okupiĝi pri malsanuloj, juste disdividi la nutraĵojn kaj loĝejojn, riparadi loĝejojn kaj la trafikajn sistemon, purigadi publikajn lokojn. Multaj konsilioj instaligis ankaŭ en diversaj ministerioj, sed ankaŭ ĉe la Nacia Banko, Supera Tribunalo, Ŝtata Prokuroraro, Ĝenerala Direkcio de la fervojoj, ĉe la Hungara Radio kaj ĉe la hungaraj ambasadoj en Belgrado kaj Vieno. La gvidanto de la koncerna instanco, ekzemple ministro, aŭ mem aliĝis al la konsilio aŭ estis eksoficigita. La 30an de oktobro Imre Nagy oficiale agnoskis tiujn konsiliojn kiel „aŭtonomajn demokratiajn organojn“ de la revolucio kaj petis ilian plenan subtenon. Sed kelkaj konsilioj tamen faris al Nagy kondiĉojn por la kunlaboro. Ĝis tiu tago 82 procentoj de la malnovaj ŝtataj kaj partiaj strukturoj estis ŝanĝitaj kontraŭ novaj konsilioj, kio signifis, ke la ĝisnuna ordo praktike ĉesis ekzisti kaj ke la (mal)nova restariĝis. La laboristaj konsilioj, kiuj ofte estis spontane fonditaj post perfortaj kaj sangaj konfliktoj kun anoj de ÁVO kaj disponis pri liberaj radiostacioj, kiuj dissendis el multaj urboj

per mallongaj ondoj, ricevis la subtenon de la hungara armeo. La plej signifa revolucia konsilio estis la Transdanuba Nacia Konsilio, al kiu aliĝis la 9a divizio de la hungara armeo. La plano fondi Centran Revolucian Konsilion estis malhelpita de la dua sovetia atako en novembro.

Kiam la 26an la 'milita' situacio ŝajnis favori la ribelulojn, la CK, premita de la aktualaj cirkonstancoj, faris proponojn por formi novan registaron sub la gvido de Imre Nagy. Ĝi eĉ konsentis pri la starigo de laboristaj konsilioj en la fabrikoj en kunlaboro kun la sindikatoj, kiuj estis diskredititaj kiel plenumorganoj de la registaro. Estis antaŭviditaj reformoj de la ekonomio, agrikultura politiko kaj partio gvidado, por atingi la celojn de la „socialisma demokratio“. En la koncerna deklaro estis skribite: „Interkonsente kun la tuta popolo ni preparos grandan nacian programon por demokratia, socialisma, sendependa kaj suverena Hungario.“ Sed tio estis nura hurlado kun la lupoj.

La 27an Nagy fizike kolapsis verŝajne lige kun korinfarkto, kiun li suferis la antaŭan jaron. Oni trovis lin senkonscia en la oficejo. La hungara kuracisto ne sciis kion fari. Sed feliĉe Suslov kunportis la medikamenton „Validol“, kiun li havigis al Nagy, kiu reviviĝis. Kiel oni poste eksciis, en ĉi tiu tago Gerő submetis al Nagy tekston, kiun li devis subskribi por peti helpon de Sovetunio, ke ĝi sendu trupojn al Budapeŝto por likvidi la tumulton kaj restarigi la ordon. La letero estis datita je la 24a de oktobro kaj devis pravigi la unuan sovetian atakon. Nagy rifuzis subskribi ĝin kaj lasis la taskon al Hegedüs. La 28an Nagy postulis ĉesigi la pafadon, kaj la venontan tagon li likvidis la sekurecan servon ÁVO, la ĉefan organon de la politika subpremado, kiu konstante observis, kontrolis kaj ĉikanis ankaŭ lin kaj havis agentojn kaj spionojn en la tuta lando (verŝajne ĉirkaŭ cent mil), precipe en fabrikoj kaj oficejoj. Multaj kunlaborantoj estis arestitaj, maldungitaj aŭ mallibereigitaj.

La 30an okazis nova turniĝo: Sub la premo de la aŭtonomaj konsilioj Nagy proklamis la finon de la unupartia sistemo kaj transformis sian registaron surbaze de la koalicio de 1945. Ankaŭ Kádár konsentis. La novan partian pejzaĝon konsistigis krom la komunistoj (Kádár), la 'malgrandaj' agrikulturistoj (Tildy) kaj la kamparana partio (Erdei) kiel ĉefajn politikajn fortojn, dum la socialdemokratia partio unue devis esti refondita. Kompreneble, la kamparanaj partioj postulis la reenkondukon de la grandformata privata posedo de grundo kaj tero kaj la nuligon de la kolektivigo. Sed la legitimeco kaj reala povo de tiuj partioj estis fragilaj, kio kaŭzis vakuon ĉe la politika potenco, ĉar la komunisma partio perdis sian politikan monopolon. Por memoro, la hungara popolo subtenis la ideon de libereco, demokratia socialismo. Neniu volis reiri al la „mondo de bankistoj kaj kapitalistoj“. Oni deziris konservi tiujn atingojn de la socialismo, kiuj estis utiligeblaj en demokratia sistemo.

La unua afero, kiun la delegacioj de la unuopaj politikaj partioj faris, estis postuli la maksimumon: liberajn balotojn, libere elektitajn sindikatojn, eksigi Hungarion el la Varsovia Pakto kaj proklami ĝian neŭtralecon, postuli la retiron de la sovetia armeo el Hungario kaj anstataŭigi la malnovajn Rákosi-ministrojn per aliaj. Zoltán Tildy fakte anoncis novajn liberajn balotojn. Aperis liberaj gazetoj, kiuj reflektis la spektron de tiuj politikaj fortoj. La gazeto de la studentoj nomiĝis *Egyetemi Ifjuság*, kaj la organo de la Libera Hungara Revolucia Junulara Unuiĝo estis *Szabad Ifjuság*. En tiu tuta situacio la konfuzitaj sovetianoj ludis ambivalentan rolon: Unuflanke ili signalis, ke ili pretas konsenti pri la postuloj de Nagy kaj la politikaj partioj, precipe rilate la retiron de la armeo el la lando kaj la demandon pri la membreco en la Varsovia Pakto, kio plej koncernis ilin.

En improvizita parolado sur la placo de la parlamentejo Nagy proklamis la „venkon de la revolucia batalo“. Novaj Nacia Komitato kaj Revolucia Konsilio, kiuj konsistis el diversaj politikaj partioj, transprenis la „ideologian kaj politikan administradon de la urbaj aŭtoritatoj“ de Budapeŝto kaj promesis la plenan restarigon de la aŭtonomeco de la ĉefurbo. La 2an de novembro, József Kővágó estis elektita kiel urbestro de Budapeŝto kaj Péter Bechtler kiel lia anstataŭanto. La unua estis membro de la partio de la „Malgrandaj Kamparanoj“, la alia ano de la socialdemokratia partio.

Ĉefaj hungaraj gazetoj aperintaj en 1956

La pafado dume finiĝis la 30an de oktobro. Malgraŭ ŝajna trankvileco, en tiu ĉi tago ankoraŭ okazis kruela sceno ĉe la Partia Domo, kiu staris ĉe la Köztársaság-placo. Post kiam en la tuta historia kaoso cirkuladis la onidiro, ke en la partia domo troviĝas sekreta subtera malliberejo (kio ne estis vera) kun multaj kaptitoj kaj kaŝiĝas anoj de la ŝtata sekureco, diversaj armitaj personoj lanĉis atakon kontraŭ la konstruaĵo kaj sieĝis ĝin dum pluraj horoj. Aperintaj hungaraj tankoj erare pafis kontraŭ la konstruaĵo anstataŭ defendi ĝin. Kiam la partia sekretario Imre Mező kaj du armeaj grupoj eliris la domon kun blanka flago, ili estis tuj mortpafitaj. Post tio la furioza amaso sturmis la konstruaĵon, en kiu komenciĝis kruela buĉado de gardistoj kaj uniformitaj soldatoj, kiuj estis brutale traktitaj aŭ rekte linĉitaj. Dudek ribeluloj kaj 25 defendantoj perdis la vivon. Okcidentaj gazetoj kiel *Life* kaj *Paris Match* sukcesis publikigi fotojn, kiuj ŝokis la mondan publikon. Kiel oni poste eksciis, inter la atakintoj troviĝis ordinaraj krimuloj, kiuj antaŭe estis malliberigitaj el prizonoj. Tiuj agadoj estis akompanataj de ĉasado de komunistoj, inter kiuj pluraj funkciuloj malaperis en la subteron aŭ fuĝis eksterlanden. Ŝajnas, ke la brutala kaj neakceptebla incidento ĉe la partia domo decide igis János Kádár kaj Ferenc Münnich veturi al Moskvo por interkonsultiĝi kun la sovetianoj pri la venontaj paŝoj, kiuj estis farendaj por haltigi tiun ribelon.

Situacio antaŭ la Partia Domo en Budapeŝto, sovetiaj tankoj en la stratoj de Budapeŝto
(Fonto: https://en.wikipedia.org/wiki/Hungarian_Revolution_of_1956)

Post la ŝoko de la unua atako, la sovetiaj tankoj dume malaperis el la centro de Budapeŝto. La hungara popolo ricevis la impreson, ke la situacio trankviliĝis kaj ke alvenos pli bona tempo, sen rimarki kio estas en preparo flanke de Sovetunio. Kvankam en Budapeŝto centoj da konstruaĵoj estis difektitaj aŭ ruinigitaj pro la pafado, praktike ne okazis marodadoj kaj priŝteladoj de vendejoj, do la ĝenerala disciplino estis mirinde konservita, se oni povas uzi tian vorton en tiaj militecaj cirkonstancoj. La popolo ege ĝojis, komencis purigi la urbon kaj restarigi la ordon. Kadre de grandskala amnestio liberiĝis miloj da prizonanoj, nome 9962 ordinaraj krimuloj kaj 3324 politikaj malliberuloj. Inter la liberigitaj cetere troviĝis nur iamaj militkrimuloj kaj hungaraj „faŝistoj“, sed ankaŭ kardinalo Jozefo Mindszenty, kiu sidis en la prizono de 1949. Li fuĝis en la usonan ambasadejon, kie la hungara primaso loĝis ĝis septembro 1971. La hungara popolo evidente ne konsciis, ke ĝi ĝuis la plej lastajn tagojn de la libera politika kulturo. Ĉiuj tiuj homoj, kiuj liberiĝis el la prizonoj, estis perceptitaj kiel viktimoj de la Rákosi-reĝimo kaj do ricevis indulgon kaj absolvon por la krimoj, kiujn ili eventuale faris. Gyurkó parolis pri amashisterio okazinta surbaze de falsa publika konscio.¹⁴

Sed la sovetianoj, precipe Ĥruŝĉov, kiu unue havis la iluzion, ke Nagy, Gerő kaj Kádár povus fruktodone kunlabori por stabiligi la situacion kaj konservi la moskvan influon en Hungario, venis al la konkludo, ke tiun hungaran revolucion, kiu tamen intertempe signife transformis la politikan strukturon de la lando, necesas definitive haltigi, ĉar ĝi signifas grandan danĝeron por la kohereco de la socialismo. Krom tio necesis montri al la mondo, ke Sovetunio estas forta potenco. Tio signifis, ke Nagy kaj Gerő perdis la subtenon de la sovetianoj, kiuj neniam vere fidis al ili, dum János Kádár iĝis pli kaj pli preferata opcio, ĉar li havis kelkajn personajn kvalitojn kiel trankvileco, sobereco, lojaleco kaj kompromisemo, kiuj estis necesaj en tia nervoza etoso.

Sed kiu fakte estis tiu János Kádár, kies nomo daŭre aperas, kiu kunludis en la fono kaj iom poste fariĝos la ĉefa figuro de la hungara politiko?¹⁵ Membro de la komunisma partio de 1929 kaj unu el ĉefaj aktivaj partiaj gravuloj ekde 1948, li fariĝis ministro pri internaj aferoj, kiam László Rajk estis ministro pri eksteraj aferoj. En la proceso kontraŭ Rajk Kádár ludis aparte perfidan rolon: Li proponis al li pluekzisti sub alia nomo, se li konsentas pri falsa memkonfeso. Kiam la verdikto kontraŭ Rajk estis

¹⁴ Mi parte legis ankaŭ jenan libron <https://www.swissbib.ch/Record/260867950>, de kiu mi utiligis kelkajn informojn por tiu ĉi studo. La aŭtoro (1930-2005) tre persone priskribis en ĝi ankaŭ la hungaran ribelon de 1956, kies atestanto li mem fariĝis. Lia Kádár-biografio bedaŭrinde ne reprezentas pli ol plumpa hagiografiaĵo kun propagandaj celoj, en kiu esencaj problemoj de la socialismo ne estas diskutataj.

¹⁵ La nomon Kádár li adoptis en 1943, kiam li fariĝis ĝenerala sekretario de la hungara KP. Lia slovak-hungara patrino nomiĝis Czermanek kaj la nomo de lia patro, kiu havis germanajn radikojn, estis János Krezinger. Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/János_Kádár.

prenita, Kádár estis unu el la kvar personoj, kiuj subskribis la mortkondamnon kontraŭ Rajk.¹⁶ Komence de 1951 Kádár estis reelektita kiel membro de la CK kaj de la politburoo. Sed en aprilo de tiu jaro li estis subite akuzita pro spionado, ŝtata perfido kaj deviado de la partia linio. Li estis arestita kaj devis resti en la prizono ĝis aŭgusto 1954, kie li estis turmentita laŭ ordono de la AVO-ĉefleŭtenanto Vladimir Farkas. Post la liberiĝo li ne rajtis tuj esti politike aktiva, sed nur en printempo 1956 li povis daŭrigi sian politikan aktivecon. Sed Rákosi malhelpis lin, kaj nur post lia falo Kádár povis aktivi kiel partia funkciulo. Rilate al Imre Nagy, Kádár devis okupiĝi pri li kun la tasko devigi lian konfeson de propraj „eraroj“, antaŭ ol permesi al li denove ludi rolon en la partio kaj politiko.

La 1an de novembro, tago de Ĉiuj Sanktuloj, kiun la hungaroj festis, la laboristaj konsilioj de Budapeŝto decidis fini la strikon kaj repreni la laboron je la 5a de la monato. En multaj entreprenoj oni denove laboris jam ekde la 3a. En tiu ĉi tago reprezentantoj de la revoluciaj konsilioj vizitis la parlamentejon por esprimi sian apogon al la registaro de Imre Nagy, kiu samtempe transprenis la gvidon de la ministerio de la eksteraj aferoj. Tiu funkcio permesis al li voki la sovetian ambasadoron por komuniki al li siajn zorgojn, ĉar en orienta Hungario oni observis novajn manovrojn de sovetiaj trupoj. Nagy avertis Andropov, ke li plendos ĉe UN kaj ke Hungario forlasos la Varsovian pakton, se tiuj trupoj ne estos senprokraste retirataj kaj se la alveno de novaj sovetiaj trupoj en Hungarion ne estos haltigita. Andropov respondis, ke tiuj trupoj servas nur por anstataŭi la malnovajn taĉmentojn kaj ke ili havas la taskon protekti la rusajn civilulojn. Krom tio li promesis al Nagy, ke la sovetia registaro pretas diskuti pri parta retiro de sovetiaj trupoj aŭ ke la sovetiaj trupoj estos retirataj, se Nagy retiros sian plendon al UN. La ministro konsentis pri tiu promeso, sed la sovetiaj trupoj nature ne estis retirataj. Kiel kutime, la sovetianoj mensogis kaj trompis la kontraŭulojn, promesante unuan aferon, sed farante alian, inversan aferon. Dum Nagy postulis la retiron de la sovetiaj trupoj ĝis decembro, la sovetianoj insistis pri la 15a de januaro. La sovetia komandisto de Budapeŝto, generalo Kuzma Grebennik,¹⁷ cinike komentis, laŭ sovetia proverbo: „La sovetiaj trupoj forlasos Hungarion nur post kiam la kankroj fajfos kaj la fiŝoj kantos.“

En mesaĝo „al la hungaraj laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj“, kiu estis disaŭdigita tra la radio, ŝtatministro János Kádár konfesis, ke la partio misevoluis al despotismo kaj kondukis la tutan nacion al la sklaveco de la „blinda kaj krima politiko de hungaraj stalinistoj“, kiuj fiaskis „morale kaj ideologie“. Li distanciĝis de Rákosi kaj klarigis, ke la partoprenantoj en la ribelo unuavice batalis kontraŭ la Rákosi-reĝimo. Li eĉ gloris la popolan ribelon kaj samtempe laŭdis la lojalecon de la hungaroj al la socialismo, sed li ankaŭ anoncis, ke oni refondos la komunisman partion kiel „Hungara Socialisma Laborista Partio“. Fortaj vortoj! Estas pruvite, ke inter la 25a de oktobro kaj la 1a de novembro Kádár intime kunlaboris kun Nagy kaj en la intertraktoj kun la sovetianoj apogis liajn postulojn, kiuj inkluzivis la retiron de sovetiaj trupoj el Hungario kaj la ekŝigon de la lando el la Varsovia Pakto, al kiu Hungario devis aliĝi en majo 1955.¹⁸

La 3an de novembro la hungara registaro estis renovigita kaj nun konsistis el *Imre Nagy, István B. Szábo, István Bibó, Ferenc Farkas, József Fischer, János Kádár, Gyula Kelemen, Anna Kéthly, Béla Kovács, Géza Losonczy, Pál Maléter, Zoltán Tildy*.¹⁹ Ĉi tiuj membroj reprezentis la malnovan koalicion de la diversaj partioj, kiu estis subtenata de ĉiuj partoj de la hungara popolo.

Sed la sovetianoj pli kaj pli perdis la paciencon kun la hungaraj reformoj, kiuj tute ne disvolviĝis en ilia senco. La politika kurso de Hungario ŝajnis al ili „tro liberalisma“. La sovetianoj, precipe Malinin kaj Andropov, sovetia ambasadoro en Budapeŝto, ankoraŭ traktadis la aktualajn aferojn kun la hungaroj, sed tiuj traktadoj estis nur ŝajnaj, ĉar la sovetia politburoo (konsistanta el Ĥruŝĉov, Bulganin, Molotov, Kaganoviĉ, Voroŝilov, Malenkov, Mikojan, Suslov, Ĵukov k.a.) jam decidis lanĉi duan armean intervenon en Hungario, pri kiu la sovetianoj diskutis kun alilandaj komunismaj partneroj de la Varsovia

¹⁶ Pri lia rolo en la proceso kontraŭ Rajk, regas ioma malklareco. Kádár mem donis nur nebulan klarigon, kiam oni demandis lin pri tiu ĉi temo ĉ. la jaroj 1987-89, kvazaŭ li ne bone memoris, kaj emfazis, ke li estis kontraŭ la aresto de lia partia kolego kaj ke lia ministerio de la internaj aferoj ne respondecis pri la proceso kaj kondamno de Rajk, sed la sekreta servo de Farkas.

¹⁷ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Kuzma_Grebennik.

¹⁸ Pri la Varsovia Pakto aŭ Traktato vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Varsovia_Traktato.

¹⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Tria_Kabineto_Imre_Nagy.

Pakto malantaŭ la dorso de la hungara registaro, do kun GDR-anoj (Ulbricht), rumanoj (Gheorghiu-Dej), poloj (Gomułka), bulgaraj, ĉeĥaj kaj slovakaj komunistoj, al kiuj Moskvo povis fidi. Sed Ĥruŝĉov ne hezitis konsulti ankaŭ la komunismajn partiojn de Ĉinio (Mao Zedong) kaj Jugoslavio (por ricevi la aprobon de Tito li speciale vojaĝis al Brioni). Ĉiuj tiuj komunismaj partioj timis kolapson de la socialisma sistemo. Ŝajnas, ke Ĥruŝĉov kaj la sovetianoj venis al la konkludo, ke estus eraro ne interveni en Hungario, ĉar ili opiniis, ke tio povus kuraĝigi la okcidentajn, ĉefe usonajn, britajn kaj francajn „imperiistojn“ helpi al la hungaroj kaj mem interveni en Hungario por forpreni ĝin el la orienta bloko, kion la sovetianoj nature volis eviti. Sed tiu timo certe estis vana. Nur Mikoĵan denove estis kontraŭ apliko de perforto, dum Molotov pledis por rigora solvo de la problemo por ne perdi Hungarion kiel membron de la komunisma mondo.

Kiam Nagy ricevis certigitajn informojn pri baldaŭa dua atako de sovetiaj trupoj kontraŭ Hungario, li anoncis al la mondaj diplomatoj en Budapeŝto la eksiĝon de sia lando el la Varsovia Pakto kun tuja valideco. Krom tio, li alvokis Unuiĝintajn Naciojn, kies membro Hungario fariĝis nur en decembro 1955, kaj la kvar ĉefpotencojn agnoski la neŭtralecon de Hungario kaj meti la hungaran demandon sur la tagordon. La konsilio de ministroj de Hungario, al kiu apartenis ankaŭ János Kádár, aprobis tiun decidon.

La komuniko, kiun Imre Nagy laŭtleĝis en la radio, havis jenan enhavon:

„Hungara popolo! La nacia registaro, plena de plej profunda respondeco por la hungara popolo kaj ties historio, plenumante la nedividitan volon de milionoj, proklamas la neŭtralecon de la hungara Popola Respubliko. Sur la bazo de la sendependeco kaj egalrajteco kaj kongrue kun la spirito de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj la hungara popolo deziras vivi en fidela amikeco kun siaj najbaroj, Sovetunio kaj ĉiuj popoloj de la mondo. La hungara popolo esperas fortigi kaj pluevoluigi la atingojn de sia nacia revolucio, sen devi aparteni al unu el la ĉefaj potencoj. La revo de jarcentoj de la hungara popolo plenumiĝis. La revolucia batalo, kiun la popolo kaj ĝiaj herooj plenumis, fine kondukis la aferon de la libereco kaj sendependeco al la venko. Tiu heroo batalo ebligis emfazi nian bazan nacian intereson, nome la neŭtralecon, en niaj internaciaj rilatoj. Ni direktas al niaj najbaroj kaj al ĉiuj landoj la peton respekti la neŝanĝeblan decidon de nia popolo. Fakte estas vere, ke nia popolo estas tute unuanima en tiu ĉi decido kiel neniam antaŭe en sia historio. Laborantaj milionoj de Hungario! Protektu kaj fortigu kun revolucia verovo, sinofera laboro kaj firmo la ordon – nian landon, la liberan, sendependan, demokratian kaj neŭtralan Hungarion!“

Kiel oni rimarkis meze de tiu revolucia patoso, Nagy tute forgesis uzi vortojn kiel socialismo aŭ komunismo.

Dua sovetia atako kaj la sekvoj

La 4an de novembro frumatene la loĝantoj de Budapeŝto estis vekitaj pro la bruo de tankoj kaj pafado. Per la kodvorto „Tondro-444“ estis enkondukita la operaco „Tempesto“ (ruslingve „Viĥr“), ordonita de marŝalo Konjev, ĉefkomandisto de la trupoj de la Varsovia Pakto, kaj gvidata de marŝalo Ĵukov, sovetia ministro pri defendo, kontraŭ Hungario, por sufoki la ribelon per neimagebla brutaleco. Ĉi-foje, en la operaco partoprenis 17 divizioj aŭ 31'500 sovetiaj soldatoj. Tiu armeo disponis pri ĉ. 2500 tankoj kaj tanksimilaj veturiloj kaj 1000 akompanaj veturiloj kaj estis akompanata de artilerio kaj aviadiloj, kies rolo ŝajne estis minimuma. Flanke de la hungara armeo estis envolvitaj 25'000 soldatoj kaj 1500 sekretaj servistoj. En Budapeŝto la tankoj okupis tutajn domblokojn kaj pafis kontraŭ diversaj konstruaĵoj, kie oni supozis batalantojn de la ribelo. Pripafitaj estis precipe la Kilián-kazerno, la hotelo Royal kaj la Novjorka Palaco. Ankaŭ la Korvina trapasejo estis dum horoj krude pripafata de kanonoj ĝis kiam tuta divizio povis sturmi la fortikaĵon de la „korvinistoj“, kiel la tieaj batalantoj estis nomataj. Aliaj bataloj okazis sur la Marksa placo, la Kalvina placo kaj je la flanko de Buda sur la kastelo kaj la monto Gellért, krome ĉe la Széna-placo, la Móricz-Zsigmond-ringo kaj ĉe la suda stacidomo. Atestantoj rakontis al la UN-komisiono, ke la sovetiaj tankoj pafadis kiel frenezuloj kaj arbitre kontraŭ loĝdomoj, en kiuj ili suspektis ribelulojn kaj por timigi la homojn, senkonsidere al la kvanto de viktimoj. Ili ankaŭ ne hezitis pafi kontraŭ civiluloj, ĉefe virinoj kaj infanoj, kiuj staris antaŭ vendejoj. Ili rakontis, ke per sia pafado

sovetiaj trupoj malhepis la urĝan helpon al vunditoj. Sovetiaj soldatoj eĉ enpenetris malsanulejojn kaj forprenis vunditojn, kiujn ili konsideris kontraŭ-revoluciuloj. Krom tio, la emblemo de la Ruĝa Kruco estis misuzita de sovetiaj soldatoj kaj de ÁVO. Okazis ankaŭ aliaj incidentoj, laŭ kiuj oni devas konkludi altgradan barbaran konduton de la sovetiaj trupoj, kiuj konsistis grandparte el soldatoj de sovetiaj respublikoj de Centra Azio. Ĉar al tiuj soldatoj la sovetiaj gvidantoj ne diris, ke ili devos kontraŭbatali hungarajn laboristojn, ili kredis, ke ili estis transportitaj al Egiptio por defendi tiun landon kontraŭ francaj kaj anglaj imperiistoj. Tiuj fremdaj soldatoj estis surprizitaj, kiam ili ne renkontis faŝistojn, kiel oni diris al ili, sed studentojn kaj laboristojn, simplajn virojn kaj virinojn, kiuj plendis, ke ili estas subpremataj de Sovetunio.

La familioj de la sovetiaj armeanoj en Hungario estis evakuitaj, se tio ne jam okazis dum la unua sovetia atako.

Nagy-ministro Zoltán Szántó estis avertita de la jugoslavia ambasadoro en Budapeŝto en telefona parolado je la unua horo de la 4a de novembro, ke la sovetia atako baldaŭ komenciĝos kaj ke Imre Nagy kun aliaj registaranoj venu al la ambasadejo. Sed Imre Nagy iris dormi kaj ne estis atingebla. Je la 3h30 li informiĝis, ke la sovetia agreso komenciĝis.

Je la 5h20 la radio disvastigis jenan komunikon de Nagy: „*Atenton! Atenton! Ĉefministro Nagy direktas sin nun al la hungara popolo: Ĉi tie parolas Imre Nagy, la prezidanto de la Konsilio de ministroj de la Hungara Popola Respubliko. Frumatene, sovetiaj trupoj atakis nian ĉefurbon kun la klara intenco faligi la laŭleĝan demokratian registaron de la Hungara Popola Respubliko. Niaj trupoj batalas. La registaro troviĝas sur sia loko. Mi sciigas tiujn faktojn al la hungara popolo kaj al la tuta mondo.*“ Ĉi tiu komunikado estis disvastigita en diversaj lingvoj kaj finita per la nacia himno de Hungario.

Je la 7h14 la radio disaŭdigis komunikon en hungara kaj rusa lingvoj: „*La hungara registaro petas la oficirojn kaj soldatojn de la sovetia armeo, ke ili ne pafu. Evidu verŝadon de sango. La rusoj restos niaj amikoj.*“

Je la 8h45 sekvis nova radiokomunikado de Imre Nagy, per kiu li diskonigis la proklamon de la milita stato kaj avertis, ke ĉiuj, kiuj lezas la validajn leĝojn, estos punitaj per la morto. Tio estis surpriza anonco, kiu konfuzis la homojn, kiuj denove demandis sin, je kiu flanko Nagy nun vere staras, ĉar la popolo ricevis la impreson, ke Nagy subskribis la registarajn dekretojn. Sed kompreneble, li estis devigita fari tion, probable kun pistolo kontraŭ lia dorso. Kvaronhoron poste la radio komunikis, ke la hungara registaro petis la helpon de la sovetiaj trupoj kontraŭbatali la „kontraŭ-revoluciajn banditojn“, kiuj „enpenetris fabrikojn kaj publikajn konstruaĵojn, kie ili mortigis multnombre civilulojn, anojn de la naciaj defendaj fortoj kaj servistojn de la ŝtata sekureco“. Oni certigis, ke „la sovetiaj trupoj restarigos la ordon laŭ la deziro de la registaro“ kaj alvokis la popolon „subteni la sovetiajn trupojn plenumi ties taskojn“. La budapeŝta radio „Kossuth“ ankoraŭ disaŭdigis, en la angla, germana kaj rusa lingvoj, la plej lastan alvokon de la hungara verkista asocio, kiu direktis ĝin al ĉiuj verkistoj, sciencistoj, akademiuloj, sciencaj asocioj por peti eksteran helpon. En Dunapentele, kie post la 4a de novembro troviĝis la radiostacio „Rákóczi“, oni petis helpon per armiloj, materialoj kaj medikamentoj.

Fontoj: https://hu.wikipedia.org/wiki/1956-os_forradalom, https://ru.wikipedia.org/wiki/Венгерское_восстание_1956_года, https://en.wikipedia.org/wiki/Battle_of_the_Corvin_Passage.

Fakte, la hungara popolo atendis helpon de ekstere, de la Okcidento. Kvankam Unuiĝintaj Nacioj (UN) malgraŭ la kontraŭstaro de Sovetunio ja metis la hungaran demandon sur sian tagordon por devigi Moskvon retiri sian armeon el Hungario kaj verkis ampleksan raporton pri la situacio en tiu lando (la hungara registaro rifuzis kunlabori), Usono, gvidata de prezidento Dwight D. Eisenhower (1953-61) kaj John Foster Dulles, ministro pri eksteraj aferoj, certigis al Moskvo, ke Vaŝingtono ne intencas enmiksiĝi en la hungara konflikto. La usonanoj klarigis, ke la hungara demando havas neniun prioritaton por ili kaj pritaksis la opcion de perforta interveno en Hungario nerealisma. Tamen, Eisenhower almenaŭ

sendis telegramon al Moskvo, en kiu li postulis la retiron de la sovetiaj trupoj. Sed li ricevis nur sekan respondon de Bulganin, kiu funkciis kiel ĉefministro. La Okcidento estis okupata pri la Suez krizo, en kiu la okcidentaj potencoj perforte intervenis, ĉar la egiptoj ŝtatigis la Suezan Kanelon, kaj la sovetianoj minacis apliki nukleajn armilojn por defendi siajn interesojn en Egiptio,²⁰ kaj tiel la hungara ribelo okazis en la ombro de tiu eĉ pli grava internacia krizo. Ankaŭ CIA estis admonita de la usona registaro, ke ĝi trankvile rilatu al la hungara krizo. La rakonto, ke CIA kuraĝigis la hungarajn ribelulojn tra Radio Libera Eŭropo batali kontraŭ la sovetianoj, evidente estis fabelo, t.e. malica aserto de la sovetia propagando, kiu klopodis misfamigi la hungaran revolucion. La vero estas, ke la munkena radiostacio, precipe ĝia hungarlingva eldono, akre polemikis dum la tuta krizo kontraŭ Nagy, kiu estis traktata de la usonanoj kun malfido; kun li oni ne emis rilati, ĉar malgraŭ ĉia simpatio, kiun li ŝajnis havi por la ribelo, li estis konsiderata de Usono kiel persono tro proksima al Moskvo, kie li vivis multajn jarojn. Bizara detalo en tiu tuta dramo estis, ke Otto von Habsburg, la plej maljuna filo de la plej lasta imperiestro de Aŭstrujo-Hungarujo (Karlo) kaj akra kontraŭulo de la komunismo, petis la hispanan generalon Francisko Franco helpi al la subpremataj hungaroj. La hispanoj fakte eĉ konsentis liveri armilojn, sed la usonanoj kontraŭis tian dubindan planon. Pro la pasiva sinteno de Usono, Eisenhower kaj Dulles estis akre kritikitaj de Henry Kissinger, aŭtoro de gravaj studoj pri ekstera politiko, kiu iam poste mem fariĝos usona ministro pri eksteraj aferoj. En Okcidento okazis kelkaj protestaj agadoj, precipe en Belgio, kie studentoj volis sturmi la sovetian ambasadejon, kaj certe la okcidenta gazetaro reagis treege negative pri la sovetia interveno en Hungario. Miklós Horthy, la intermilita gvidanto de Hungario, kiu ankoraŭ vivis (li forpasis en febrauro 1957), alvokis Unuiĝintajn Naciojn interveni en Hungario „por protekti la homajn rajtojn“.

György Dalos menciis la nomojn de aliaj protagonistoj de la hungara ribelo de oktobro kaj novembro 1956, ekzemple *Péter Mansfeld*, *József Dudás*, *János Szabó*, *László Zólmoy* kaj *Károly Kiss*, kies nekutima kuraĝo kaj karismo fakte superas la imagojn de la postaj generacioj. *József Dudas* paroladis sur la Széna-placo kaj proklamis sian propran politikan programon, konsistantan el 25 punktoj. *János Szabó* komandis la ribelulojn de la Széna-placo, *István Angyal* kaj *Otto Szirmai* batalis en la Tűzoltó-strato. Inter la aktivaj hungaraj ribeluloj cetere troviĝis ankaŭ ne malmultaj kuraĝaj virinoj. Inter ili elstaris *Erika Kornélia Szeles*, naskita en 1941, kiu partoprenis la ribelon kaj estis mortpafita de sovetiaj soldatoj la 7an de novembro, kiam ŝi volis transporti vunditon. En tiu ĉi tago veturilo de la Ruĝa Kruco estis pripafita de maŝinaj fusiloj. Ŝia vizaĝo fariĝis simbola bildo de la hungara ribelo de 1956, kies proklamita heroino ŝi fariĝis en la postkomunisma Hungario. Szirmai, *László Nickelsburg* kaj Szeles estis judoj. Paul Lendvai, mem judo, atentigis, ke la hungara ribelo restis, kun kelkaj marĝenaj esceptoj, kvazaŭ mirakle sen antisemitisma subtono, kio ne estas memkomprenebla en la kazo de Hungario, en kiu pluraj judaj komunistoj ludis gravan politikan rolon. Sed dum la ribelo mem la juda temo havis praktike neniun signifon.²¹

Galerio de kelkaj ĉefprotagonistoj de la Hungara Popola Ribelo de oktobro 1956: Béla Király (juna kaj maljuna), Pál Maléter, József Dudas, János Szabó, István Angyal, Ottó Szirmai, László Nickelsburg, Miklós Gimes, Erika Szeles.

En Budapeŝto kaj kelkaj aliaj urboj la bataloj daŭris ankoraŭ plurajn tagojn; en Budapeŝto mem ĝis la 8a, en iuj eksterurbaj industriaj distriktoj ĝis la 11a. La hungaroj kuraĝe kaj brave defendis sian revolucion ĝis la 12a de novembro, kiam ili perdis la batalon kontraŭ la supera potenco de la sovetia malamiko, ĉar mankis homfortoj, materialo kaj municio kaj forestis helpo de ekstere. Malgrandaj taĉmentoj rezistis ankoraŭ en Csepel, Dunapentele, Jászberény, Tatabánya, Miskolc kaj Székesfehérvár, Pécs kaj Veszprém, en la montaro de Bükk, Nógrád kaj Mátra. En Miskolc studentoj de la universitato batalis kontraŭ sovetiaj trupoj kaj senutile riskis sian vivon. Ĉe Győr, Szombathely kaj Komárom hungaraj ribeluloj batalis kontraŭ sovetiaj trupoj, kiuj verŝajne venis el Ĉeĥoslovakio. La lernantoj de la armea akademio Zrinyi en Budapeŝto kaj la budapeŝta tanka brigado mem montris apartan heroecon, kiam en la montaro de Mátra ili kuraĝe batalis kontraŭ tuta sovetia tanka divizio.

²⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Sueza_krizo.

²¹ La historio de la antisemitismo en Hungario dum la komunisma periodo estis detala traktita de Paul Lendvai en lia elstara libro *Antisemitismus ohne Juden* (1972). Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Lendvai.

La Nacia Gvardio, kiu estis fondita la 31an de oktobro surbaze de interkonsent inter Imre Nagy kaj la ribeluloj de anoj de la „Revolucia Armea Konsilio“ – *Béla Király*, *Pál Maléter*, *Gyula Váradi*, *András Marton* kaj *István Marián* – , kaj kiu havis la taskon kunigi ĉiujn ribelantjn fortojn, devis kontraŭbatali ĉiujn internajn kaj eksterajn malamikojn, kiuj atakas Hungarion kaj lezas ĝian sendependecon, La gvardianoj minacis, ke ili ekbatalos kontraŭ la sovetiaj trupoj, se ili ne forlasos Hungarion ĝis la 31a de decembro. Sed tia scenaro ne plu okazis. Kvankam *Király* ankoraŭ provis kontraŭstari la sovetiajn tankojn, li finfine devis rezigni kaj fuĝis en la apudbudapeŝtan montaron. La 9an li forlasis la landon kaj poste forveturis al Usono kaj tiel do povis eviti la saman sorton kiel Nagy kaj la ceteraj. En Okcidento li fariĝis unu el la kontraŭ-komunismaj gvidantoj de la hungara emigracio.

Pál Maléter, hungara ministro pri defendo, ŝtatministro *Ferenc Erdei*, la ĉefo de la generala stabo kaj alia kolonelo estis transportitaj al *Tököl*, kie troviĝis la ĉefkomandejo de la sovetia armeo por trakti la aferojn kun la sovetianoj, sed ili estis arestitaj de KGB-ĉefo *Ivan Serov*.

La registaro de Nagy alvenis ĉe la fino kaj disfalis. La ministroj fuĝis en diversajn ambasadejojn, Nagy mem kun kelkaj kolegoj elektis la jugoslavianojn, kio montriĝos por Nagy fatala kaptilo. Ŝajnas, ke Nagy unue intencis iri al la sovetia ambasado por protesti kontraŭ la agreso. Nur *István Bibó*, signifa intelektulo kaj gvida forto de la Nacia Kamparana Partio (aŭ *Petőfi-Partio*), decidis resti en la parlamentejo, kiu estis ĉirkaŭita de sovetiaj trupoj. Li verkis deklaron, kiun li sendis al la ambasadoj de Usono, Francio kaj Britio, kaj en kiu li alvokis la hungaran popolon agnoski nek la okupacian sovetian armeon nek la instalotan marionetan registaron kiel ŝtatan aŭtoritaton kaj kuraĝigis ĝin pasive rezisti la fremdajn okupantojn. La grandpotencojn kaj Unuiĝintajn Naciojn li atentigis, ke la sola jure akceptebla reprezentanto de la hungara diplomacia servo en eksterlando estos *Anna Kéthly*. Ĉi tiu nekutime kuraĝa virino prezidis la Socialdemokratian Partion kaj estis ministrino, fakte vic-ĉefministrino de la Nagy-registaro. En 1957 ŝi forlasis Hungarion kaj neniam revenis. En Belgio ŝi gvidis la „Konsilion de la Hungara Revolucio“.

Sen la scio de Nagy, *Kádár* kaj *Münnich* (la ĉi-lastaj ĉi-foje formale - kaj redatite - petis la helpon de Sovetunio por la dua interveno), kun kiu ili ĉesigis la rilatojn, flugis al Moskvo por diskuti kun la sovetianoj la starigon de nova, „kontraŭ-revolucia“ registaro. En junio 1957 *Kádár* klarigis, ke li devis agi tiel por eviti internan militon en Hungario. Radio Szolnok komunikis, ke formiĝis nova registaro, t.n. „Hungara Revolucia Laborista kaj Kamparana Registaro“, kiu estas gvidata de *János Kádár* kaj konsistas el la ministroj *Ferenc Münnich*, *Sándor Rónai*, *György Marosán*, *Antal Apró*, *Imre Horváth*, *Imre Dögei*, *István Kossa*, k.a. Ĉe tiuj funkciuloj – kelkaj ec ne konsciis, ke ili apartenas al la nova registaro – esence temis pri obeemaj komunistoj aŭ kriptokomunistoj, kiuj apogis la sovetian flankon. Tamen, kiel *Kádár*, laŭ *Gyurkó*, atestis, ĉiu el tiuj registaranoj havis alian imagon pri kiel savi la socialismon. La registaro, kiu vokis sovetian helpon, havis la taskon restarigi la „nacion sendependecon, la laŭlegan ordon kaj la amikecon kun la socialsimaj landoj“ kaj „defendi la socialisman sistemon“. *Kádár* alvokis la popolon senarmigi la „kontraŭ-revoluciajn bandojn“ kaj helpi la novan registaron plenumi ties programon, kiu konsistis el 15 punktoj. En la radio *Münnich* diris, ke „ni decidis batali kun ĉiuj niaj fortoj kontraŭ la minacanta danĝero de la faŝismo.“ Diversaj lokaj radiostacioj diskomunikis ordonojn de la sovetiaj okupantoj, ke la civiluloj transdonu la armilojn, okupiĝu pri la restarigo de la ordo kaj reprenu la laboron. Ekzistas nenia dubo, ke ĉe ĉiuj tiuj pintaj hungaraj funkciuloj parolis la voĉo de la sovetianoj.

Post la sufokita ribelo, en kiu oni povas diri, ke ĉiuj batalis unuj kontraŭ la aliaj, la sovetia KGB, helpata de hungaraj sekurecaj servistoj, traktis Hungarion kiel okupatan landon, instalante sovetiajn administraciojn. Armeĝeneralo *Serov*, kiu gvidis la operacojn de KGB ankaŭ en Hungario, sukcesis kapti kelkmil personojn, kiujn li dume tenis en aresto. Ĉ. 860 oni transportis, tra *Záhony*, al Transkarpatio sur sovetian teritorion. Dum la arestado, kolektado kaj deportado de suspektitaj hungaraj „kontraŭ-revoluciuloj“ la sovetiaj soldatoj kaj *ÁVO*-fortoj traktis tiujn homojn simile kiel siatempe la nazioj traktis la judojn, kaj en Sovetunio ili estis traktitaj laŭ NKVD-metodoj. La UN-komisiono povis enketi ok tiajn deportitajn personojn, kiuj rakontis diversajn terurajn spertojn, kaj parte esplori tiun skandalon. Kiam tiaj homoj, surprize trafita de arestado, demandis la sovetianojn pri la kialo de sia

malliberigo, la sovetianoj respondis, ke la Kádár-registaro petis la sovetiajn aŭtoritatojn fari tion. Sed la hungara registaro neis tiajn deportadojn. Pro la protesto de la konsternita popolo, kiu malkovris tiujn sekretajn transportojn, Kádár sentis sin devigita peti la sovetianojn ĉesigi la translokadon de hungaraj civitanoj al Sovetunio. Do, ne estas klare kiom da hungaroj estis deportitaj, kio okazis kun ili en SU kaj ĉu ĉiuj revenis. Kvankam Kádár promesis, ke la sekureca polico ÁVO estos abolita, ĝiaj iamaj anoj estis reserĉataj, malliberigitaj el la prizonoj kaj reengagitaj por subpremi kaj persekuti la restintajn rezistantojn.

Ĉefaj sovetiaj respondeculoj pri la disbatado de la hungara ribelo: Partiestro Ĥruščov, ambasadoro Andropov, sovetiaj politikistoj Mikojan, Suslov, marŝaloj Konjev kaj Ĵukov, KGB-ĉefo Serov, generalo Grebennik. (Fonto: Vikipedio).

Por la „normaligo“ de la situacio en Hungario la sovetia armeo pagis altan prezon. Kiel oni eksciis 37 jarojn poste, ĝi perdis en tiu batalo 669 (Dalos), eble eĉ 700-720 soldatojn, 1450 (1541 laŭ Dalos) vundiĝis kaj 51 ne estis retrovitaj. Hungaraj historiistoj estimas, ke en la 8a kaj 9a distriktoj de Budapeŝto la sovetianoj perdis 80 procentojn de sia soldataro. Ekzistis ankaŭ sovetiaj komandistoj, kiuj komprenis, ke la invado kaj okupacio de Hungario estas sensenca kaj maljusta afero. Flanke de la hungaraj batalantoj, kiuj konsistis ĉefe el junularo kaj laboristoj, estis nombritaj 2500 mortintoj kaj 20 mil vunditoj, 1569 civilaj viktimoj. Flanke de la hungara armeo, armitaj fortoj de la ministerio de internaj aferoj, polico kaj limgardistaro pereis 423 homoj, la ribeluloj kaj nacia gvardio perdis 105 soldatojn. Centoj da konstruaĵoj estis komplete detruitaj, miloj estis difektitaj. En Budapeŝto la damaĝo estis kalkulita per 700 milionoj forintoj, kaj la perdo, kiun faris la vendistoj, estis 200 milionoj forintoj. Laŭ indikoj de Gyurkó, la ribelo kaŭzis al Hungario damaĝon de 3 miliardoj forintoj, kaj la perdo pro neokazo de produktado egalas al 20 miliardoj. Do, la bilanco estis ege negativa praktike por ĉiuj flankoj, kaj la reputacio de Sovetunio en la mondo estis ruinigita.

La speciala UN-komisiono, kiu esploris la eventojn en Hungario kaj verkis la menciitan raporton, kiu klopodis detale rekonstrui la okazaĵojn dum la ribelo, demandante multajn atestantojn de la hungara ribelo, venis al la konkludo, ke la hungara ribelo ne estis anticipe preparata de la hungaraj ribeluloj kaj ke ĝi okazis spontane kaj en la komenco sen perforto. La dinamiko de la ribelo kaŭzis, ke la batalantoj, kiuj ricevis armilojn de laboristoj, utiligis ilin vole ne vole dum la ribelo por defendi sin kontraŭ la sovetiaj trupoj kaj tankoj, kiuj atakis Hungarion, ĉar la moskvaj regantoj tion decidis sen demandi la hungarojn mem. Koncerne la rolon de radiostacioj kiel Libera Eŭropo au BBC, la koncernaj atestantoj diris, ke dum la ribelo tiuj radiostacioj utile raportis pri la aktuala situacio kaj kuraĝigis la hungarojn, ke ili povos atendi apogon de Unuiĝintaj Nacioj en formo de pactrupoj, kiuj finfine ne venis. La UN-komisiono ankaŭ trovis neniun pruvon, ke iu ajn signifa personeco de la antaŭmilita hungara reĝimo en iu ajn formo influis la hungaran ribelon de oktobro kaj novembro 1956. La sama komisiono rifuzis ankaŭ la aserton aŭ supozon, ke konsiderinda nombro de agentoj, sabotuloj aŭ iamaj naziaj faŝistoj revenis al Hungario por partopreni en la ribelo. La komisiono ankaŭ speciale esploris la aserton de la rezolucio de la hungara KP de la 5a de novembro, laŭ kiu la hungara ribelo estis „horthysma-faŝisma hungara kapitalisma-feŭda kontraŭ-revolucio“ kaj venis al la konkludo, ke „la kontraŭ-revolucio, kiu vere okazis, estis efektivigita de la sovetiaj regantoj, kiam ĝi anstataŭigis helpe de armeaj superfortoj socialisman, sed demokratian reĝimon, kiu estiĝis en Hungario, per polica ŝtato.“ Ĉi tiun interpreton konfirmas la aserto de Imre Nagy, ke la dua atako de la sovetia armeo celis forpuĉi lian hungaran registaron, pri kiu ekzistas neniu dubo, ke ĝi estis konstitucie laŭleĝa. Nagy prave konsideris la sovetian agreson „kruda enmiksiĝo en la internaj aferojn de Hungario“ flanke de fremda potenco, eĉ se Hungario de facto estis membro de la Varsovia Pakto, kiu organizis la intervenon. Do, ĉiuj asertoj de la sovetianoj estis puraj malveroj kaj mensogoj.

La amara fino de Imre Nagy kaj la cinika ‘realpolitika’ triumfo de la sovetianoj

La ĉeesto de Imre Nagy, de liaj kunlaborantoj-ministroj kaj ties familianoj en la ambasadejo de Jugoslavio (Paul Lendvai detale priskribis en sia libro la cirkonstancojn de tiu situacio), signifis grandan kaj nedezirindan ŝarĝon por la Tito-registaro, kiu same kiel ĉiuj aliaj soclandoj aprobs la sovetian intervenon. Sed la jugoslavo sentis sin devigitaj doni sian promesitan protekton al la Nagy-registaro,

kiuj estis minacataj de arestado kaj persekutado, kaj komencis intertrakti kun la hungaroj kaj sovetianoj por solvi la embarason. Kádár donis skriban garantion al Nagy kaj ties akompanantoj, ke ili povos libere forlasi la jugoslavian ambasadejon kaj reiri hejmen, sed tiu promeso montriĝis mensoga kaj trompa. Fakte okazis alia scenaro, kiu estis diskutita kaj interkonsentita kun la rumana ĉefministro Gheorghiu-Dej. Kiam la hungaroj forlasis la ambasadejon je la 22a de novembro vespere, aŭtobuso transportis ilin unue al la sovetia komandejo en la urba distrikto Mátyásföld, kie ili estis devigitaj subskribi deklaron, ke ili subtenas la Kádár-registaron kaj pretas libervole vojaĝi al Rumanio (pri tio okupiĝis Münnich, ministro pri armeo kaj sekureco, kaj Walter Roman, la ĉefo de la rumana sekureca servo). Kiam ili rifuzis subskribi tion, la familioj estis separatitaj, kaj la venontan tagon Nagy kaj liaj kolegoj estis veturigitaj al la arma flughaveno de Budapeŝto kaj kontraŭ ilia volo transportitaj per sovetiaj aviadiloj al Bukareŝto, de kie oni daŭrigis veturi kun ili al iuj vilaoj en Snagov, ripozejo de la rumana nomenklaturado, kie la familioj de Imre Nagy, Géza Losonczy kaj Ferenc Donáth estis aparte loĝigitaj sub severa kontrolado de soldatoj. Kvankam la sovetianoj komence ne vere sciis, kion fari kun la Nagy-grupo, ili komencis kolekti kompromitan materialon pri Nagy kaj liaj kolegoj, kiu poste ideale servis al la tribunala proceso kontraŭ ili. Krom la sovetianoj, kiuj trompis ĉiujn flankojn, neniu estis vere kontenta pri tiu solvo, nek hungaroj nek jugoslavo, kiuj sentis sin bruskitaj kaj formale protestis.

La hungara revolucio tamen ankoraŭ ne estis tute finita. La revoluciaj laboristaj konsilioj, kiuj estiĝis en la tempo de la Nagy-registaro kaj konkurencis la partiajn sekciojn kaj sindikatojn en la entreprenoj, ankoraŭ ne ĉesis funkcii. Kun ili Kádár eĉ traktis demandojn de la kunlaboro, aliflanke, li klopodis konvinki ilin, ke ili estas „sur malĝusta vojo“. La regantaj komunistoj ege timis tiujn konsiliojn, kiuj reprezentis ion kiel la veran demokratian socialismon, ĉar ili povintus renversi ilan potencon. La sovetianoj jam timis ĝermi kaj eksplodi novan, 'duan hungaran revolucion' kaj per siaj tankoj subpremis ĉiujn pli grandajn manifestiĝojn, kiuj minacis ilian ordon. Kiam en la industria urbo Salgotarján 3000 laboristoj protestis kontraŭ la arestado de du ministroj, sovetiaj tankoj pafis, post provoko de hungaraj sekurecaj fortoj, kontraŭ la amaso kaj mortigis 131 el ili, dum 150 vundiĝis. La laboristaj konsilioj decidis proklami ĝeneralan strikon, sed la sovetianoj perdis la paciencon kaj malpermesis la laboristajn konsiliojn. La ĉefaj gvidantoj *Sándor Rácz* kaj *Sándor Bali* estis arestitaj. Iom post iom la laboristaj konsilioj estis devigitaj rezigni pri sia aktiveco, ĉar ili tute ne plu povis plenumi siajn taskojn.

Precipe la hungaraj intelektuloj, verkistoj kaj artistoj, kiuj kontraŭstaris la novan reĝimon, estis brutale subpremataj kaj persekutataj de la Kádár-reĝimo. Kiam la 21an de novembro estis fondita „Revolucia Komitato de Intelektuloj“ sub la gvido de la komponisto *Zoltán Kodály* (1882-1967), la regantaj komunistoj reagis amoke. La alvoko de tiu komitato, kies membroj jam antaŭsentis, kio atendas ilin, se ili kontraŭstaros la kurson de la novstalinisma reakcio, havis jenan enhavon: „La plej sankta rajto, kiun la literaturo kaj la artoj atingis per la revolucio, estas la libereco kaj la rajto diri la veron. Ni protektos tiun rajton. (...) Estonte ni partoprenos en la laboro de la gazetaro kaj radio nur sub la kondiĉo, se ĝia reganta principo estas la vero kaj la servado al la popolo. (...)“ La 24an de novembro la sama komitato eldonis manifeston, kiu estis subskribita de 110 gvidaj personecoj de la kultura vivo en Hungario. Ili anoncis, ke ili kuraĝe eltenos reprezaliojn kiel enprizonigon, deportadon aŭ morton, kiuj eventuale trafos ilin sub la nova reĝimo. La ministro pri internaj aferoj reagis al tiu alvoko per la cinikaj rimarkoj, ke „ne ekzistas avantaĝoj por kontraŭ-revoluciuloj, kies profesio hazarde estas la verkado“. Kaj ŝtatministro Marosán avertis, ke la registaro ne hezitos rompi ĉian reziston flanke de tiaj verkistoj kaj ĵurnalistoj kaj ke „ĉiuj kontraŭ-revoluciaj, burĝaj, naciismaj kaj anarkiismaj tendencoj en hungaraj publikaĵoj estos senkompate subpremataj“. La verkistoj liberigu sin finfine de la „spirita teroro“, kiun ili lanĉis. Eĉ la ministro pri agrikulturo enmiksiĝis en la debaton, atestante, ke la „plimulto de la verkistoj de la hungaraj verkistoj elektis la vojon de la perfido.“ La 21an de aprilo 1957 sekvis komunikado en la radio, kiu anoncis la likvidon de la hungara verkista asocio kun la klarigo, ke montriĝis, ke certa aktiva grupo de la asocio utiligis ĝin por ataki la socian ordon de la Hungara Popola Respubliko. Pluraj verkistoj kiel ekzemple *István Örkény* kaj *Tibor Déry* estis subpremataj kaj ne plu rajtis publike skribi dum multaj jaroj. La mondfama marksisma filozofo *György Lukács* (1885-1971), iama membro de la hungara parlamento, ministro pri kulturo de la Nagy-registaro kaj unu el la intelektaj gvidantoj de la Petőfi-cirklo, estis arestita, diskreditita kaj ekskludita el la Akademio, kaj liaj verkaĵoj povis esti presitaj nur en Okcidento.

Sándor Kopácsi, alia ano de la Nagy-registaro, estis arestita de KGB jam la 5an de novembro kaj poste kondamnita al dumviva arestpuno. Rákosi, Gerő kaj Hegedüs malaperis al Sovetunio, kie ili daŭrigis intrigadi kontraŭ Kádár kaj la laboristaj konsilioj, kiujn oni denuncis kiel kontraŭ-sovetiajn ktp. Dum Rákosi restis en Sovetunio ĝis sia morto en 1971, Gerő (mort. 1980) kaj Hegedüs (mort. 1999) poste revenis al Hungario, sed Kádár strikte malpermesis al ili esti politike aktivaj.

Post kiam la perarmea subpremado estis finita, sekvis la forpuŝado kaj likvido de nekumunismaj partioj. Antaŭ ol malaperi, en memorando de la 8a de decembro la nekumunismaj partioj ankoraŭ formulis siajn kondiĉojn por partopreni en la registara laboro. En la memorando estis skribite, ke ilia celo estas „protekti la liberecon kaj sendependecon de la lando, sekurigi la ĝisnunajn rezultojn de la socialismo, firmigi la demokratiajn atingojn de la revolucio, unuavice la laboristajn konsiliojn kaj ties aŭtonomecon, kaj fiksi en la leĝaro la rajton striki, la liberecon de la kamparanoj mem decidi, la abolon de la devigaj rikoltaj liveroj kaj fini la unupartian sistemon“. La memorando eĉ agnoskis la gvidan rolon de la komunisma partio. En la sama tago la hungara KP (kiu nun nomiĝis Hungara Socialisma Laborista Partio) publikigis rezolucion, en kiu la deziro dividi la politikan povon kun aliaj partioj estis klare neita. La socialdemokrata partio devis esti kunfondita kun la komunisma partio. Béla Kovács, la gvidanto de la partio de ‘Malgrandaj Kamparanoj’, retiriĝis de la politiko kaj la Petőfi-partio de la ‘Naciaj Kamparanoj’ likvidis sin mem.

Bibó, kiu ankoraŭ entreprenis kelkajn diplomaciajn elpaŝojn por defendi la hungaran liberecon, estis arestita en majo 1957, cetere kune kun Árpád Göncz (nekomunisto), la posta ŝtatestro, kaj kondamnita al dumviva arestpuno en malliberejo, sed post amnestio li povis forlasi la prizono en 1963. Aliflanke, *István Dobi*, la formala ŝtatestro, kriptokomunisto, kiu apogis la disbatadon de la hungara ribelo, en 1957 kaj 1963 estis konfirmita en tiu ofico. Kaj lia komplico *Sándor Rónai*, iama socialdemokrato, antaŭa ŝtatprezidento kaj parlamentestro dum multaj jaroj, ricevis en la registaro de Kádár la postenon de ministro pri ekstera komerco.

Kvankam Kádár promesis, ke jure oni ne persekutos la grupon ĉirkaŭ Imre Nagy, praktike okazis la malo. La 14an de aprilo 1957, Nagy kaj lia grupo estis arestita en Snagov kaj transportita al Budapeŝto. La ‘koncepto’ de la lanĉota proceso antaŭvidis akuzojn pro „preparado de la ribelo kune kun la imperiistoj“, „konspiro kontraŭ la popoldemokratia ŝtatordo“ kun la provo „akapari la povon“, kio povis signifi nur „ŝtatan perfidon“. Kádár ankoraŭ ornamis la akuzojn per ideologiaj ĵargonaĵoj kiel „perfido kontraŭ la laborista klaso“, „rezigno pri la povo de la laborista klaso“ k.s. La (sekreta) proceso estis malfermita la 5an de februaro 1958, sed interrompita kaj prokrastita ĝis junio. La verdikto estis prononcita la 15an de junio: Imre Nagy, Pál Maléter kaj Miklós Gimes estis kondamnitaj al morto kaj ekzekutitaj la postan tagon. Aliaj (Kopácsi, Donáth, Tildy, Janósi, Vásárhely) ricevis multjarajn arestpunojn en prizono. La radio diskonigis la decidon en la 17a de junio. Ŝajnas, ke Ĥruŝĉov estis kontraŭ mortkondamnoj kaj ekzekutoj, sed Kádár, kiu devas esti konsiderata kiel ĉefa motoro de la proceso, restis malmola kaj senkompromisa. Krom en Ĉinio, kie la komunistoj cinike bonvenigis la eventon, la mortigo de la protagonistoj de la hungara ribelo kaŭzis ŝokon kaj protestojn en la tuta mondo.

Kvankam Kádár ankaŭ certigis, ke neniu hungaro suferos damaĝon pro la partopreno en la hungara ribelo, sub la Kádár-reĝimo intensiĝis senkompata persekutado de diversaj grupoj, kiuj iel rilatis al la oktobra/novembra ribelo de 1956. Praktike ĉiu hungaro estis kontrolata por vidi, ĉu li aŭ ŝi partoprenis en la ribelo, kaj se jes, ilin atendis kruela puno. La 11an de decembro estis enkondukita eksterordinara juro, per kiu ĉiu mortkondamnita persono (ekzemple pro nepermesita posedo de armilo) povis esti tuj ekzekutita. La 12an de januaro 1957 oni eĉ plirapidigis la tribunalajn procedurojn. La finkalkulado de la Kádár-aparato, kiu celis timigi la tutan popolon, trafis milojn aŭ dekmilojn da homoj, de kiuj multaj aŭ malaperis en malliberejoj, specialaj koncentrejoj aŭ internigaj lagroj (en Tököl kaj Kistarcsa), aŭ kiuj estis mortkondamnitaj (entute kelkcent – oficiale 229 inter decembro 1956 kaj aŭgusto 1961). Multaj laboristoj perdis sian laborlokon, oficiroj sian rangon. Aparte rigore la politika polico traktis intelektulojn kaj verkistojn, kiuj „kulpis“ pro „reviziisma perfido“. Ankaŭ tiuj homoj estis punitaj, kiuj faligis la Stalin-monumenon en Budapeŝto. Akuzitaj estis ankaŭ personoj, kiuj kontrabandis manuskriptojn de verkaĵoj de Imre Nagy al Okcidento kaj reenkondukis liajn presitajn librojn en Hungarion. Entute 35 mil juraj procesoj estis lanĉitaj, sed oni povis ĵeti nur 20 mil homojn en

malliberejojn, ĉar la kapacito ne sufiĉis. Likviditaj estis, cinike kaj kvazaŭ simbole, homoj el ĉiuj sociaj tavoloj, de iama ĉefministro ĝis la simpla metilernanto. Inter tiuj viktimoj troviĝis ankaŭ majoro Antal Pálinká, kiu liberigis kardinalon Mindszenty. Do, kiel la UN-raporto klarigis, sub la sovetia administrado kaj en la tempo de la reakcia Kádár-registaro estis faritaj neimageblaj krimoj kontraŭ la homaj rajtoj, Nur post 1961/62 Kádár bridis tiujn persekutajn ekscesojn, sed la partoprenintoj en la hungara ribelo restis stigmatizitaj dum la tuta tempo de la popolrespubliko kiel malamikoj de la socialismo kaj alfrontis gravajn traŭmojn, ekzistajn problemojn kaj malavantaĝojn en sia vivo kaj en sia lando, en kiu ili decidis resti. Ĉiuj formoj de sendependaj politikaj, kulturaj kaj intelektaj forumoj, kie la hungaroj povus diskuti siajn problemojn, estis likviditaj kaj malpermesitaj. La plena dimensio de tiuj grandskalaj persekutoj, reprezalioj, subpremoj kaj ĉikanoj, kiuj estis intertempe iom forgesataj, fariĝis pli klaraj kaj evidentaj nur post 1989, kiam fakuloj komencis esplori la historion. Nature, Kádár, Kállai aŭ Münnich neniam povis esti akuzitaj antaŭ tribunalo pro tiuj krimoj, kvankam la komunisma partio estis kovrita per sango, ĉar komunisma Hungario ne estis demokratia kaj jura ŝtato laŭ okcidenta kompreno, kiu traktis krimojn laŭ alia maniero ol en komunisma ŝtato, kie tia krimo ne estis konsiderata iel tia.

Tiuj estas la ĝeneralaj trajtoj de la hungara dramo de 1956 kaj ties tragika fino en rapida resumo. Kiu deziras konatiĝi kun pli da detaloj de tiu historio, al tiu mi rekomendas konsulti la elstarajn librojn de Paul Lendvai, György Dalos kaj János M. Rainer pri la hungara ribelo de 1956 kaj Imre Nagy aŭ legi la menciitan UN-raporton de 1957, kiu aperis en pluraj lingvoj. Peter Gosztony kompilis legindan libron kun raportoj de atestantoj de la ribelo. Nagy cetere postlasis „Politikan testamenton“, kiu aperis germanlingve en 1959 kun leginda enkonduko. Laŭ mia scio, en Esperanto bedaŭrinde ekzistas neniu libro pri la temo, kaj en la Esperanto-gazetaro la evento estis prisilentata, kvazaŭ ĝi neniam okazis.

Mi volas fini ĉi tiun ĉapitron pri la historio de la hungara ribelo de 1956, kiu kortuŝis min persone pli multe ĉi-jare ol iam ajn antaŭe, per la bela omaĝo, kiun Paul Lendvai formulis pri tiu evento: „Post la dua mondmilito la hungara revolucio estis la plej granda defio por la sovetia hegemonia potenco en orienta Eŭropo kaj larĝe videbla simbolo de la bankrotiĝo de la socialismo laŭ sovetia tipo. Ĝi estis internacie atentata okazaĵo, kiu formis la profunde pozitivan bildon pri Hungario ĝis hodiaŭ. Ĝi estis ‘venka malvenko’, aŭtentika ‘kontraŭ-totalisma’ revolucio, kaj eble ĝi estis antaŭ ĉio ‘fantasta historio’. Estas paradokse sed vere: La morala signifo de tiu revolucio de la senespero estis vidata kaj honorata en eksterlando pli bone ol en Hungario mem.“

La esenco de la hungara revolucio de 1956 estis ankaŭ trafite formulita en la menciita libro de Peter Gosztony kun la raportoj de atestantoj: „La Hungara Ribelo de aŭtuno 1956 estis lukto por nacia memdetermino de la hungara popolo, ribelo kontraŭ la reganta komunisma partio, en kiu oni vidis la nuran plenumanton de ideologia kaj reala sovetia pretendo de regado. Ne la ekonomia situacio, kiel ajn malbona ĝi estis, kaŭzis tiun ribelon, sed la deziro je libereco, nome en la klasika senco de la ‘libereco de la pensado’. La opozicio, kiu baziĝis je la ‘laboristoj de la pensado’, baldaŭ kaptis ĉiujn tavolojn de la hungara popolo, fine ankaŭ la armeon, dum sole la sekreta polico restis lojala. Estus tamen erare vidi la hungaran popolan ribelon simple nur kiel kontraŭ-komunisman aŭ kontraŭ-revolucian movadon. La hungaroj ne intencis likvidi la socialismon, sed temis pri tio, ke oni volis reformi ĝin en la senco de ‘demokratia socialismo’.“

Post la disbatado de la ribelo la hungara popolo retroviĝis kvazaŭ en simila situacio kiel en 1945, kiam la dua mondmilito finiĝis, kaj en novembro Budapeŝto aspektis kiel post la milito. La homoj en Hungario bezonis ĉiuspecan helpon, de nutraĵoj ĝis vestaĵoj. Tia helpo estis organizata kaj interne de Hungario kaj venis de eksterlando, kiu sendis amase pakajojn kun diversaj varoj. La budapeŝtan flughavenon Ferihegy regule atingis aviadiloj el Svislando (Ruĝa Kruco), Jugoslavio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Rumanio kaj Belgio. Krom ricevi tiajn sendaĵojn, la hungaroj rajtis ankaŭ senpage rericivi la posedaĵojn, kiujn antaŭe ili sekvestris pro manko de mono. Ĉar multaj ne plu vidis perspektivon de la vivo en sia lando, ili decidis forlasi ĝin, kiel rakontos la venonta ĉapitro.

Ondo de hungaraj rifuĝintoj de 1956 kaj la rolo de Svislando

Post kiam la ribelo estis sufokita en la tuta lando, komenciĝis granda amasfuĝado de homoj el Hungario. Pli ol 200'000 hungaroj forlasis sian patrujon por trovi ŝirmon en Okcidento, precipe Aŭstrio, Germanio kaj Svislando. 20'000 homoj dume fuĝis al Jugoslavio. Kvankam la sovetia armeo protektis la okcidentan limon de Hungario, ĝi ŝajne ne tro malhelpis al la fuĝantoj forlasi la landon. La unuaj 70'000 hungaroj fuĝis trans la malgranda ligna ponto de Andau (h. Mosontarcsa). La 21an de novembro hungaraj soldatoj eksplodigis kaj detruis tiun ponton.

Aŭstrio kaj Germanio grandanime helpis al la hungaraj rifuĝintoj laŭ diversaj eblecoj kaj rimedoj, malfermante siajn limojn. La germana Ruĝa Kruco kolektis kvin milionojn da markoj. Paul Lendvai supozis, ke tia grandanima helpo fariĝis ebla por iusence korekti la erarojn faritajn dum la dua mondmilito, en kiu milionoj da judoj estis persekutitaj kaj mortigitaj. Moskvo malafable reagis al la politiko de tiuj landoj, kiuj riskis novan malboniĝon de la rilatoj kun Sovetunio. Aŭstrio ĵus estis liberigita de la sovetia kontrolo, kaj la rusoj estis aparte ĉagrenitaj, ke Vieno aŭdacis kritiki la politikon de Moskvo en Hungario, kiu maltrafis la eblecon fariĝi neŭtrala ŝtato same kiel Aŭstrio.

Verŝajne unu triono de hungaraj elmigrintoj estis homoj, kiuj aktive partoprenis en la ribelo mem. La plimulto de la rifuĝintoj baldaŭ forlasis Aŭstrion, kie restis nur 7'900 personoj. Grandparto tamen decidis resti en Okcidento kaj ne reiri al Hungario: 40'000 plumigris al Usono, 27'000 al Kanado, 21'000 al Grandbritio, 12'000 al Francio, 11'000 al Aŭstralio. Pro tiu amasfuĝado Hungario perdis multajn junajn fakulojn: Inter la rifuĝintoj troviĝis 10'000 inĝenieroj. 22% el ili laboris en la industrio kaj estis metilaboristoj (22% seruristoj, 7,9% veldistoj kaj tornistoj, 3,6% elektrikistoj) kaj 5,5% estis ministoj. Certe, multaj estis ankoraŭ junaj kaj unue devis finlarni sian profesion aŭ en la emigracio elektis aliajn profesiojn. 10% de la virinoj estis dommastrinoj. Ĉar plejparte temis pri homoj sub la 40a jaraĝo, ili sufiĉe facile adaptiĝis en la fremda civilizo, malgraŭ la grava lingvoproblemo kaj la nostalgio, kiu kaptis multajn el ili. Multaj politike aktivaj elmigrintoj ne ricevis hungaran vizon ĝis 1989. Certaj hungaraj rifuĝintoj, kiuj kuraĝis reveturi al Hungario, travivis malagrablajn surprizoj kun la justico kaj polico.

Ĉ. 14'000 hungaraj rifuĝintoj translokiĝis al Svislando, kie plimulto restis kaj alkiutimiĝis al tiu nova socio, kiu mirinde sincere bonvenigis ilin. La 20an de novembro 1956 ĉiuj preĝejaj sonoriloj de Svislando akompanis triminutan publikan silentadon. La konsternita svisa registaro, kiu ne kutimas polemiki kontraŭ fremdaj ŝtatoj, komentis la eventon en Hungario per la vortoj, ke doloras la fakto, ke lando, kiu havas amikajn rilatojn kun Svislando kaj konas tradiciojn de sendependeco, libereco kaj la rajto mem decidi, estas subpremata de fremda potenco. Tiel, la svisa registaro admiris la hungaran ribelon kaj nerekte kritikis la sovetian politikon en tiu krizo, aliĝante al la oficiala aŭstra sinteno, kiun Berno plene aprobis. Kvankam neŭtrala ŝtato, Svislando fariĝis integra parto de la Okcidento kaj aplikis deciditan kontraŭ-komunisman sintenon, kio faris la rilatojn kun la socialismaj landoj nefacilaj. La svisa solidareco kun Hungario, la simpatio por la hungara popolo kaj la protesto kontraŭ la sovetia agreso estis tiel fortaj, ke Svislando bojkotis la Olimpikajn Ludojn, kiuj okazis en tiuj monatoj en Melburno (Aŭstralio). Koncerne la duan mondmiliton, Svislando rifuzis ne malmultajn judojn ĉe sia landlimo, de kiuj nekonata nombro verŝajne pereis en la neniigejoj de la „Tria Regno“. Nun ĝi bonvole akceptis hungarajn rifuĝintojn sen ajna limigo, kvankam oni ne sciis, kiaj homoj troviĝas ankaŭ inter ili (povis esti ankaŭ spionoj kaj agentoj de Moskvo, komunistoj, judoj, kiuj kaŝiĝis kiel hungaraj rifuĝintoj,²² k.a. nedezirindaj personoj).

Cetere, Hungario havas longan sperton kun rifuĝintoj: Kiam la turkoj konkeris Balkanion en la 17a jarcento, amaso da serboj el suda kaj slovakoj el norda direkto fuĝis al la Hungara Reĝlando, kiu malgraŭ hungariga politiko estis konata kiel tolerema al naciaj minoritatoj. En la jaroj 1690/91 temis pri 200 mil serbaj rifuĝintoj, kiuj estis akceptitaj en Hungarujo. La turka okupacio de Hungarujo mem kaŭzis amason da hungaraj rifuĝintoj, kiuj postlasis la regionojn, en kiuj ili vivis, dezertaj. Post la tranĉado de la hungara reĝlando, en la 1920-aj jaroj alfluis amaso da rifuĝintoj el ĉiuj najbaraj regionoj,

²² Inter la ducent mil hungaraj rifuĝintoj troviĝis ankaŭ ĉ. 20 mil judoj, kiuj forlasis Hungaron pro diversaj kaŭzoj.

kiuj iam apartenis al Hungaruj: rumanoj, serboj, slovakoj... Post la germana atako de Pollando en septembro 1939, centmiloj da popoloj fuĝis al Hungario, kiu permesis al ili pluveturi al Francio kaj Britio.

Diversaj versioj de hungaraj flagoj kaj blazonoj 1867-2016 (la tria de dekstre kun la truo 'validis' dum la ribelo en 1956, en kiu la sovetia simbolo estis eltranĉita) (https://de.wikipedia.org/wiki/Flagge_Ungarns)

Hungario sub la regado de János Kádár post 1956

Post la perarmea disbatado de la ribelo sekvis kampanja fazo de la ideologia pravigo, dum kiu la komunistoj devis klarigi al la popolo la kaŭzojn de la hungara krizo de la jaro 1956 kaj kial la ribelo devis esti sufokita kaj la socialisma ordo restarigita. El la vidpunkto de tiuj komunistoj temis pri kvar esencaj faktoroj, kiuj estis respondecaj por tiu krizo, kiu rekte kondukis al la „kontraŭ-revolucia“ ribelo: 1. Eraroj de la dogma sektemo de la Rákosi-Gerő-kliko; 2. Agado de la kontraŭ-partia interna opozicia grupo ĉirkaŭ Imre Nagy kaj Géza Losonczy, kiuj alianciĝis kun la reakciaj fortoj en la partio, armeo kaj polico; 3. Instigado fare de la fortoj de la Horthy-faŝismo, de la burĝaro kaj hungaraj kapitalismaj grandbienfarmistoj, de la politikistoj en la ekzilo, de la etburĝaj intelektuloj kaj diversaj krimaj elementoj; 4. Ekstera enmiksiĝo de la internacia imperiismo kaj de eksterlandaj sekretservoj. Ĉi tiu dubinda sed netuŝebla paradigmo de absurdaj klarigoj kaj pravigoj, per kiu oni povis akuzi kaj kulpigi malamikojn, servis kiel bazo por la legitimeco de la Kádár-reĝimo, kiu vokis sovetian helpon por sufoki la ribelon kaj restarigi la komunisman ordon, kaj validis ĝis la fino de januaro 1989, kiam povis okazi nova pritakso de la historio kaj de la hungara ribelo mem. Se László Gyurkó do skribis (p. 152), ke tiu analizo estis historie ĝusta, bedaŭrinde ankaŭ li estis blinda je unu okulo.

Krome oni devis rememorigi al la popolo la historiajn cirkonstancojn de la klasbatalo kaj la esencon de la socialisma revolucio kaj de la socialismo mem, kun formuloj, kiuj havis aparte groteskajn trajtojn, ĉar ili havis marksisman-leninisman originon kaj logikon.

En artikolo aperinta en la sovetia gazeto *Pravda* de la 18a decembro 1956, kiu esis dediĉita al la situacio en Hungario, la sovetia KP klarigis sian starpunkton jene: „Tiel longe ke ekzistas ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, tiel longe ke kapitalistoj havas la povon kaj la laboristojn en la manoj, tiel longe la konflikto inter burĝoj kaj la proletoj estos la elirpunkto por la analizo de historiaj eventoj. La reviziismo ripete provis forpreni al la laborista klaso la marksisman kompason de la manoj, kiu ebligas al ĝi, ĝuste rekoni la direkton de la okazaĵoj.“ Kelkajn tagojn poste la gazeto, kiu senskrupule nomis la hungara ribelon „sanga regado de la faŝisma reakcio“, aldonis, ke sian „helpon“ al la „hungara laborista klaso“ Moskvo konsideris „internacia devo“. La kulpon pri la hungaraj eventoj *Pravda* simple ŝovis al Rákosi kaj Gerő, kiuj respondecas pri „gravaj eraroj“. Hungaraj lakeoj kiel István Dobi kaj Sándor Rónai devis plene kondamni la politikon de Rákosi kiel „malbonan, stultan kaj pekan (sic)“.

Pri revolucio kaj kontraŭrevolucio Münnich klarigis en februaro 1957: „Kiel vi scias, la nocio de la revolucio estis reformulita de la aŭtoroj de la socialismo, Marx kaj Engels. Laŭ ilia difino revolucio signifas amasan batalon de la subpremata klaso kontraŭ la subpremantoj kaj ekspluatantoj (...). Ĉu tiuj, kiuj partoprenis la ribelon, estis membroj de subpremata klaso? Ĉu ili batalis kontraŭ socia sistemo, kiu subpremis ilin? Mi ne kredas tion, ĉar nia popoldemokratio ĉiam estis ŝtato de la laborista klaso kaj de la laboranta loĝantaro. (...) La trajtoj de revolucio do ne estas troveblaj ĉi tie.“

Iu rusa verkisto (kiu restis sennoma en la UN-raporto) skribis, ke „vento el la Okcidento „[t.e. la burĝa ideologio] gravedigita per la putra odoro de la korupto“ jam de longe infektis la hungarajn verkistojn. Al ili oni riproĉis kontraŭ-leninisman sintenon kaj ke ili disvastigis „nihilismajn“ konceptojn sub la flago de la „libereco de la pensado“ kaj de la „krea libereco“. Ktp.

Estas klare, ke sub tiaj 'betonaj' cirkonstancoj en Hungario objektiva analizo de la krizo (de la socialismo) kaj ribelo ne povis okazi, kaj ajna provo publike diskuti pri tiu temo komplete perdis sian sencon kaj ne estis ebla. Sed ekzistas nenia dubo, ke en Moskvo kelkaj politikaj respondeculoj klare komprenis la motivojn kaj kaŭzojn de la hungara ribelo.

János Kádár, kiu finfine plene aprobis la sovetian intervenon, kondamnante la ribelon kiel atakon „de kontraŭ-revoluciaj, reakciaj elementoj“, apogis ankaŭ tiujn interpretojn kaj do komplete refalis en malnovajn komunismajn kategoriojn kaj stereotipojn, ĉar iun alian sintenon li ne konis. La 11an de majo 1957 li diris en la hungara parlamento: „Ni subtenas la Varsovian Pakton kaj sekve ni subtenas ankaŭ la ĉeeston de sovetiaj trupoj en Hungario, tiel longe ni staras vidalvide de la agresema ambicio de la imperiistoj kaj la amasiĝo de imperiismaj armeoj.“

Certe, Kádár mem ankaŭ tre bone sciis pri kio temis, se laŭ Radio Budapeŝto de la 15a de novembro li klarigis al delegacio de la laborista konsilio de Grand-Budapeŝto laŭsence, ke „ni estis devigitaj peti la intervenon de Sovetunio, ĉar ni staris tuj antaŭ renverso de la potenco fare de la popolo. Ni komprenis, ke tiu tuta movado ne povis esti priskribita kiel kontraŭ-revolucio, sed ĉar la laboristoj faris kontraŭ-revoluciajn postulojn, ni venis al la konkludo, ke la kontraŭ-revolucio de la popolo devis esti rompita per ĉiuj rimedoj, eĉ per la helpo de sovetiaj trupoj.“ Ankaŭ ĉi tiu ĉitaĵo impresas ilustre, ke Kádár troviĝis en granda embaraso, kiam li devis pravigi la sovetian agreson kontraŭ sia lando.

La temo de la hungara ribelo ne estis fintraktita per la jaro 1956. La 4an de februaro 1957 la hungara registaro transdonis al UN memorandon, en kiu estis emfazite, ke la celo de la hungara kontraŭ-revolucio estis restarigi la sistemon de la kapitalistoj kaj de la grandaj terposedantoj kaj ke la apogo per armiloj el eksterlando estas pruvita.

Ĝis 1989 la hungaraj registaroj de la komunisma partio de Kádár, kiuj ekzistis el nuraj pajlohomoj de Moskvo, plene dependis de la sovetia protekto kaj en principo komplete malhavis moralan apogon ĉe la hungara popolo. János Kádár perfekte konsciis pri tio, ĉar jam en Moskvo li atentigis la sovetiajn kamaradojn pri tiu problemoj, kiu poste neniam povis esti solvita. Kádár ne nur estis konsiderata de la hungaroj kiel perfidulo kaj trompisto, sed li ankaŭ fariĝis ostaĝo kaj lakeo de la sovetianoj, kiuj fakte regadis la landon precipe pere de la kontrolistoj Malenkov, Suslov kaj Aristov. Suslov estis konsiderata kiel ĉefideologo de KPSU. Certe, Kádár devis tiel agi, kiel li agis, sub la premo de la sovetianoj, kiuj ordonis tiun politikon, kvankam li mem eble havis iom aliajn imagojn pri la estonteco de Hungario, kiujn li esprimis jam antaŭ kaj dum la ribela tempo. Kiel jam aliloke en tiu ĉi studo menciite, Kádár klare komprenis la problemojn en la lando, kiam ekzemple en majo 1957 li agnoskis la malkontenton de la hungaraj laboristoj. Kvankam Kádár komprenis la realan malkontentecon de la hungaraj laboristoj kaj nemalgranda parto de la hungara popolo, memkritiko pri stalinismo kaj socialismo estis al li nature komplete fremda.

Kádár ĉiam asertis, ke li faris por Hungario, kion li povis fari. koncerne la ribelon de 1956, kiun li nomis (plej malfrue en 1972) „nacia tragedio“, ankoraŭ en majo 1957 konfesis memkritike, ke la konduto de la hungara registaro, kiu ne kapablis trafe reagi al tiu situacio por kontentigi la atendojn de la popolo, estis hontinda. Povas esti. Iusence, el Saŭlo fariĝis Paŭlo, ĉar dum la 60aj kaj 70aj jaroj evidentiĝis, ke Kádár, eble la plej sobra, realisma, respondeca kaj *kompromisema* el ĉiuj tiamaj hungaraj politikistoj, montriĝis ege utila por Hungario, al kiu li povis eviti similan sorton, kiun havis Rumanio sub Ceaușescu aŭ Ĉeĥoslovakio sub Husák. Kádár ne volis ripeti la erarojn de la Rákosi-tempo. La hungaroj rearanĝis sin kun tiu (mola) diktatura reĝimo, adaptis sin al sistemo, kiun ili ne povis ŝanĝi, respektante la fiksjajn regulojn de la politiko kaj la netuŝeblajn tabuojn de la historio, al kiuj apartenis la hungara „kontraŭ-revolucio“ de 1956 kaj la hungara nacia demando, sed ankaŭ la sovetia politiko en si mem kaj la monopola regado de la KP.

En la venontaj jardekoj Kádár klopodis gvidi la politikon en Hungario tiel, ke oni povis observi liberalismajn tendencojn en la kadro de la eblecoj, kiuj estis unikaj en komparo kun aliaj socialismaj landoj, kvankam ankaŭ tie oni entreprenis iujn reformprovojn en la 60aj jaroj, kiuj tamen fiaskis senescepte. En tiu specife hungara reĝimo, kiu estis nomata „gulaŝa komunismo“ kaj estis praktikata en la „plej gaja barako de la socialisma tendaro“, kiel Hungario estis ironie nomata, la komunistoj lasis la homojn trankvilaj, se ili respektis iliajn principojn „ni supre okupiĝas pri politiko, vi sube okupiĝas pri viaj privataj aferoj“. Sed tiu „gaja barako“, en kiu validis la moto „kiu ne estas kontraŭ ni, tiu estas por ni“, estis bone vartata: La armeo de la sovetiaj okupantoj konsistis el 58'000 soldatoj. Poste, tiun armeon konsistigis eĉ 70'000 sovetiaj soldatoj kun preskaŭ 1000 tankoj, 1500 fortikigitaj veturiloj, 622 artileriaj

pafiloj kaj 196 raketaj baterioj (Lendvai, Orbán, p.13). La cinika generalo Grebennik, ĉefkomandisto de la sovetiaj trupoj en Hungario, emfazis en sia publika parolado de la 5a de novembro 1956 al la hungara popolo, ke la sovetia armeo ne troviĝas en Hungario, ĉar ili bezonus pli da tero aŭ resursoj, sed ĉar la laborista kaj kamparana registaro de Kádár petis la sovetian armeon, „helpi likvidi la kontraŭ-revoluciajn fortojn“. Li alvokis la oficirojn kaj soldatojn de la hungara armeo batali kune kun la sovetiaj trupoj „por libereco kaj demokratio kontraŭ la senbridaj fortoj de la reakcio“. Do, la sovetianoj simple turnis la faktojn kaj kondukis ilin al absurdo.

Nature, pri demokratio Kádár havis primitivan komprenon. Sub demokratio li komprenis, se la plimulto de la laborista klaso, la kamparanoj kaj la popolamasoj sekvas la ideon kaj la politikon de la komunisma partio kaj solvas la taskojn de la gvidantoj. Due, demokratio esprimiĝas, kiam inter homoj, ekzemple inter komunistoj, sed ankaŭ inter komunistoj kaj nekomunistoj, ekzistas diversaj opinioj, kiujn oni ne ignoru. Al la adreso de la verkistoj de 1956 li mesaĝis, ke ili parte pravis, kvankam ili estis forte kritikataj de la partio. Ĉar Kádár konis nur la komunisman mondon, alia kompreno pri demokratio ne estis atendebla ĉe li.

Lige kun la ekonomia liberaligo kaj politika malstreĉigo, la lando estis iom post iom ankaŭ malfermata al la turismo eĉ trans la blokaj limoj mem, tiel ke pli kaj pli da hungaroj, fakte centmiloj, povis vojaĝi al eksterlando, ankaŭ al Okcidento, kaj multaj alilandanoj, precipe el la orienta bloko mem, amase vizitis Hungarion, kiu fariĝis kaj restis unu el malmultaj libere viziteblaj feriaj landoj por soclandanoj. Ĉiuj tiuj saĝaj kaj ruzaj klopodoj havigis al Kádár certagradan respekton kaj agnoskon en la mondo kaj ĉe la hungaroj mem, kiuj konsideris kaj komencis eĉ ŝati lin kiel „patron de la nacio“, iom post iom forgesante la kruelajn reprezaliojn kaj krimojn plenumitajn de la komunistoj kontraŭ la hungara popolo, en kiuj ankaŭ Kádár ludis gravan rolon. Kritiko kontraŭ li fariĝis nedezirata. Krom la ĝeneralaj limigoj de la komunisma ideologio kaj la metodoj de la planekonomio, kiuj bremsis kaj paralisis la dinamikon en la lando mem kaj kaŭzis altgradajn oportunismon, hipokritecon, malrespondecon kaj indiferentecon, la „stabileco“ de la Kádár-reĝimo signifis samtempe teruran stagnadon, subpremadon kaj limigon de liberecoj en ĉiuj sferoj de la vivo, tiel ke ankaŭ post 1956 multaj hungaroj forlasis la izolitan landon por vivi aliloke. En la malfruaj 80aj jaroj la malfacilaĵoj de Hungario neevitebla kreskis, ĉar la socialismo ŝtoniĝis, Kádár oldiĝis, ne volis demisii kaj fine perdis la lucidon. La lando suferis pli kaj pli gravan ekonomian krizon kaj dependis de eksterlandaj monkreditoj. Kun Miĥail Gorbaĉov, kiu alvenis en marto 1985 kiel nova ĝenerala sekretario de KPSU, el Moskvo blovis nova vento, kiu ne plu favoris malnovajn komunistojn kiel Kádár. Nova generacio de reformemaj hungaraj komunistoj kiel *Károly Grósz*, *Miklós Németh*, *Imre Pozsgay*, *Gyula Horn* transprenis la sceptron. Tiel, ankaŭ por János Kádár la tempo finiĝis. Li forpasis la 6an de julio 1989. Per tio alvenis la definitiva fino de la malnova Hungario, kiu liberiĝis de la komunismo kaj en la 23a oktobro estis proklamita respubliko.

Diversspecaj 'herooj' lige kun la hungara ribelo: Imre Nagy sur la titolpaĝo de *Der Spiegel*, n-ro 45/1956 (Germanio); Kiĉa heroigo de la „nekonata batalanto“ de la hungara popola ribelo kiel „viro de la jaro“ sur la titolpaĝo de la usona revuo *Time Magazine* (januaro 1957) laŭ la maniero de la usona soldato en Koreio; János Kádár sur la titolpaĝo de la partiaj gazetoj *Népszabadság* kaj *Népszava* okaze de ties morto en julio 1989.

Hungario en 1989

Nova ondo de tutmonda admiro trafis Hungarion en somero 1989, kiam ĝi malfermis la „Feran Kurtenon“ kaj tiel esence kontribuis al la rapida erozio de la „Orienta Bloko“, kie la komunismo kolapsis landon post lando, por fini la „Malvarman Militon“. En januaro la komunistoj rezignis pri la monopolito de la potenco, kiu estis certigita al ili de la konstitucio, kaj ŝtatministro *Imre Pozsgay*, iama konvinkita komunisto, kiu emancipiĝis de la komunismaj teorioj, anoncis, ke la revolucio de 1956 devas esti nomata „popola ribelo“ anstataŭ „kontraŭ-revolucio“, kiel la komunistoj kutimis nomi ĝin. Imre Nagy, Pál Maléter, Miklós Gimes, József Szilágyi kaj Géza Losonczy reakiris sian perditan honoron kaj estis solene reentombigitaj la 16an de junio en ĉeesto de dekmiloj da homoj, kiuj ankaŭ kolektiĝis por festi la simblan finon de la komunisma erao. Tiam paroladis inter alie ankaŭ *Viktor Orbán*, kiu ekfamigiĝis

per jenaj vortoj: „Se ni kredas nian propran forton, ni povos fini la komunisman diktaturon, nur tiel Hungario trovos la vojon el la azia sakstrato reen al Eŭropo“. Sian politikan karieron Orbán komencis kiel ĉefo de la junulara organizaĵo de la hungara KP kaj en 1988 estis unu el la fondintoj de la dekstre konservema kaj naciisma movado „Fidesz“. Sur la placo de la libereco la opozicio laŭtlegis sian manifeston de 12 punktoj. Oficialaj hungaraj politikistoj kiel *Miklós Németh* kaj *István Horváth* anoncis, ke oni restarigos politikan plurismon, malkonstruos la „Feran Kurtenon“ kaj petos la sovetianojn retiri siajn trupojn el la lando, kion ili finfine ankaŭ faris. La rusoj (KGB-ĉefo Krjuĉkov) sendis al Budapeŝto malpurajn dokumentojn el moskvaj arkivoj, kiuj devis misfamigi Imre Nagy kiel sovetian agenton dum la 30aj jaroj. La 27an de junio, *Gyula Horn* kaj Alois Mock, ministroj pri eksteraj aferoj de Hungario kaj Aŭstrio, simbole distranĉis pecon de la „Fera Kurteno“ ĉe la limo kun Aŭstrio. La publiko en Okcidento estis mirigita kaj entuziasma, kiam ĝi vidis kuri tra tiu limtruo milojn da rifuĝintoj el GDR, kiuj tiel povis amase eskapi la mizeron en orienta Germanio kaj atingi la liberan Okcidenton. La komunisma bloko perdis la simbolojn de la mallibereco, kiujn ĝi severe gardis dum jardekoj, kaj alvenis ĉe sia totalaj morala bankroto kaj fizika elĉerpiĝo. János Kádár devis demisii de ĉiuj postenoj. En julio li forpasis en Budapeŝto. Anstataŭ la hungaroj, la nobelpremion ricevis Miĥail Gorbaĉov, prezidento de Sovetunio kaj ĉefarkitekto de la politiko de glasnosto kaj perestrojko, kiu estis honorigita pro tio, ke li ebligis la epokfarajn revoluciajn ŝanĝojn en orienta Eŭropo.

Hungario kaj hungara politiko nuntempe kaj la instruoj de 1956

En 2016 kun la 60a datreveno de la ribelo en Hungario hazarde koincidis la eŭropa krizo de rifuĝintoj. La registaroj de certaj orienteŭropaj landoj strikte kontraŭstaras kvazaŭan ordonon de Eŭropa Unio akcepti fiksan nombron de tiaj rifuĝintoj laŭ difinita kvoto aŭ disdivida ŝlosilo. Cent miloj da homoj fuĝis de la mizero en Afriko kaj arabaj landoj, precipe el Sirio, kie jam de jaroj furoris kruela milito, kiu ne volis trovi sian finon. En unika akto de helpo kaj humaneco, Eŭropa Unio, precipe Germanio, konsentis akcepti unu milionon da tiaj rifuĝintoj. Sed en sia ĉagreno pri Bruselo, Viktor Orbán, ĉefministro de Hungario, kaj lia dekstrema „Fidesz“-partio, reagis laŭ propra maniero kaj aplikis rigoran politikon por ŝirmi Hungarion kontraŭ tiu ondo de rifuĝintoj, kiuj venis tra Turkio, Grekio kaj Serbio al Hungario, kiun ili verdire volis nur trapasi por daŭrigi la vojon al okcidenta Eŭropo. Hungario rapide konstruis longan, altan barilmuron ĉe sia suda landlimo. La oficiala klarigo de Orbán estis, ke Hungario celas protekti Eŭropon de amasa invado de araboj, afrikanoj kaj islamanoj, kiu ne estas dezirinda por la eŭropa kristana civilizo. La sinteno de Orbán fakte trovis larĝan apogon precipe ĉe multaj ekstremdekstraj politikaj fortoj en Eŭropo, okcidenta kaj orienta. Flanke de certaj EU-funkciuloj Budapeŝto enkasigis rigoran kritikon: Ekzemple Jean Asselborn, ministro pri eksteraj aferoj de Luksemburgio, estis tiel ĉagrenita pri Hungario pro ties malamika politiko kontraŭ rifuĝintoj, ke li proponis eksigi tiun membroŝtaton el la unio, kaj Jean-Claude Juncker, la estro de la EU-komisiono, eĉ nomis Orbán diktatoro. Post tio la oficialaj rilatoj inter Budapeŝto kaj Bruselo atingis la nulpunkton, la reciproka malamo novan kulminon, kaj kovriĝis per glacio, kiun nur iu (fora) degela vetero povos rompi. Aparte akre kontraŭ la eŭropa politiko pri rifuĝintoj kaj kontraŭ Angela Merkel polemikas la Orbán-proksima hungara gazetarano, ekzemple *Budapester Rundschau*. En ĉi tiu gazeto elpaŝis lastatempe per ekstremismaj artikoloj iu d-ino Mária Schmidt, historiistino kaj direktorino de la budapeŝta muzeo „domo de la teroro“,²³ kiu evidente funkcias kiel ĉefideologo de la orbanisma reĝimo.

Demandataj de eŭropaj ĵurnalistoj, kial Orbán ne deziras akcepti rifuĝintojn el islamaj landoj, kvankam antaŭ 60 jaroj Eŭropo akceptis 200 000 hungarajn fuĝintojn, hungaraj oficialuloj kutime donas firmajn kaj bone preparitajn stereotipajn respondojn, kiuj eĉ ŝajnas havi certan kredindecon. Ekzemple ministro *Zoltán Balog*, kiu perfekte parolas la germanan lingvon, elokvente prezentis al la aŭskultantoj de la svisa radio la vidpunktojn de sia registaro. Inter alie, li rifuzis la riproĉon, ke Hungario ne pretas akcepti rifuĝintojn kaj azilpetantojn. Balog konfirmis, ke Hungario ja akceptas verajn azilpetantojn, sed strikte nur laŭ la validaj reguloj, leĝoj kaj praktikoj de Eŭropa Unio, dum ĉiujn aliajn rifuĝintojn, kiuj deziras azilon pro ekonomiaj kialoj, Hungario rifuzas. Laŭ li, Eŭropo ne kapablas digesti milionojn da novaj araboj kaj afrikanoj en la klopodo integri ilin en la okcidenta socio kaj entute ne povus solvi la

²³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/House_of_Terror.

mondvastian problemon de la rifuĝintoj. Budapeŝto avertis, ke inter tiuj rifuĝintoj povus troviĝi ankaŭ potencialaj teroristoj (kaj ĝi ne malpravis). Ĉar aliaj landoj de Eŭropa Unio mem ne respektas la regulojn, kiujn ili donis al si en la kazo de la apliko de kvoto de rifuĝintoj, Budapeŝto ne pretas akcepti diktojn el Bruselo. Laŭ Balog, la eŭropaj burokratoj en Bruselo estas arogantaj kaj ne konas nek komprenas la historion de aliaj, precipe orienteŭropaj landoj, al kiuj ili altrudas sian volon. Lige kun la instruoj de la historiaj spertoj de 1956 kaj la fremda okupacio Hungario rekonsciiĝas pri la valoroj de la sendependeco, memstareco, libereco, demokrateco kaj neŭtraleco. Observante la aktualan evoluon de la EU-politiko, multaj hungaroj vidas tiujn valorojn minacataj. Reage al la ideo de Asselborn, kiun la hungaroj ne povas serioze konsideri, por Balog gravas, ke Hungario restos en Eŭropo, kies integra parto ĝi estas kaj restos. Kvankam Balog konfesas, ke la hungaroj eble ne estas la plej modelaj demokratoj kaj havas propran opinion, ili tamen alte taksas la valoron de la demokratio. Sed kiel modesta popolo sen fortaj muskoloj la hungaroj konas siajn eblojn kaj limojn kaj ne celas ŝanĝi Eŭropon, sed nur konservi kaj defendi proprajn interesojn. Do, laŭ Balog, kiu krom politikisto estas ankaŭ senpartia evangelia pastoro, la tuta konflikto inter Hungario kaj EU fontas en miskomprenoj flanke de la eŭropanoj, sed ankaŭ en falsa prezentado de la aferoj kaj vidpunktoj de Hungario. Povas esti, ke la referendumo, kiun Orbán aranĝis la 2an de oktobro 2016, por ŝanĝi la konstitucion rilate la politikon pri la rifuĝintoj, estis perceptata kiel provoko kontraŭ la eŭropa politiko, sed la hungaroj defendas tiun referendumon kiel sukceson, kvankam jure ĝi ne validas. Kvankam en Hungario la demokratio ŝajnas funkcii laŭ propra logiko, Balog tamen deziras pli da interna libereco en la politiko kaj socio, kaj de Eŭropo li postulas, ke ĝi pli forte respektu la vidpunktojn kaj dezirojn de la hungaroj kaj la decidojn faritajn en Budapeŝto, kiuj konformas al la volo de la hungara popolo mem, kiu elektis Viktor Orbán kaj lian partion kiel gvidanton de la lando.

Laŭ Paul Lendvai, Orbán eluzis la krizon de rifuĝintoj por kreskigi sian popularecon, kiu denove riskis fali, kaj fortigi sian politikan potencon.

La 23a de oktobro 2016 en Budapeŝto kaj la reagoj de la kritikistoj

Sojle de la 60-jariĝo de la Hungara Ribelo de 1956, Viktor Orbán, kiu ŝajne fariĝis pli kaj pli radikala dekstrema naciisto, maltrafis neniun okazon por publike klarigi sian ideologion.

Ekzemple, okaze de la hungara nacia festotago de la 15a de marto 2016 la ĉefministro esprimis jenajn vidpunktojn:

„La sorto de la hungaroj estas tiel forte plektita kun la eŭropaj nacioj, ĝi tiel enkreskis en la komunan union, ke ankaŭ hodiaŭ neniuj popolo, inkluzive de la hungara, povas esti libera, se Eŭropo ne estas libera. Eŭropo estas tiel fragila, malforta kaj malsana kiel floro, kiu estas manĝita de kaŝita vermo. 160 jarojn post la grandaj bataloj por la libereco, Eŭropo, nia komuna domo, ne estas libera. Eŭropo ne estas libera, ĉar la libereco komenciĝas kun la eldirado de la vero. En nuntempa Eŭropo estas malpermesate diri la veron. (...) Estas malpermesate diri, ke (...) Eŭropo estas minacata de popolmigrado de multaj milionoj da homoj, kiuj pretas migradi en nia direkto. Estas malpermesate diri, ke la enmigrado alportas krimojn kaj terorismon. Estas malpermesate diri, ke homamasoj el aliaj kulturoj signifas minacon por nia vivstilo, nia kulturo, niaj moroj kaj kristanaj tradicioj. Estas malpermesate diri, ke tiuj, kiuj venis ĉi tien pli frue, jam konstruis sian propran mondon kun siaj propraj leĝoj kaj idealoj, anstataŭ integriĝi. Estas malpermesate diri, ke tiel ili kaŭzos disfalon de la jarmilon malnova strukturo de Eŭropo kaj ke tio ne estas hazarda aŭ ĉeno de neintencitaj sekvoj, sed planita operaco, kiu estas direktita kontraŭ ni. (...) Estas malpermesate diri, ke la celo de la enloĝiĝo de tiuj homamasoj estas pentri novan religian kaj kulturen mapon de Eŭropo kaj ŝanĝi ĝian etnan fundamenton por forigi la naciajn ŝtatojn, kiu estas la plej lasta obstaklo por starigi la Internacion. Estas malpermesate diri, ke Bruselo ĉiam pli kaj pli limigas nian nacian suverenecon, por kio neniuj iam ajn donis sian permeson.“

Kaj li daŭrigis klarigi la laŭdirajn konspirajn viziojn de Bruselo per jenaj drastaj avertoj:

„La nuntempaj malamikoj de la libereco estas faritaj el alia ligno ol la reĝoj kaj imperiestroj de la mezepoko aŭ la regintoj de Sovetunio; ili utiligas aliajn rimedojn por devigi nin, ke ni submetiĝu al ili. Nun ili ne malliberigos nin, ili ne deportados nin en koncentrejojn kaj ne okupos per tankoj la landojn, kiuj estas fidelaj al la libereco. Sufiĉas la bruoj de la monda gazetaro, denuncoj, minacoj kaj ĉantaĝoj. La popoloj de Eŭropo vekigis malrapide, la laboroj de Eŭropo, en kiu la vero estos subpremata, knaras kaj krakas. La popoloj de Eŭropo eble komprenis, ke ilia estonteco estas minacata: ne nur iliaj bonfarto, komforto kaj laborlokoj, sed ankaŭ iliaj sekureco kaj paca ordo estas en danĝero. (...) Nuntempe, tiu danĝero ne minacas nin, kiel tion faras militoj kaj naturaj katastrofoj (...). Tiu popolmigrado estas malrapida akvo, kiu konstante forviŝas la bordojn. Ĝi aperas en formo de humanisma afero, sed ĝia vera naturo estas la okupado de teritorio, kaj ilia gajno de teritorio estas nia perdo de teritorio. Amaso da neplibonigeblaj batalantoj por la homaj rajtoj sentas nekontigeblan bezonon instrui kaj akuzi nin. Oni asertas, ke ni estas ksenofobaj kaj malamikaj, sed la vero estas, ke la historio de nia nacio estas ankaŭ la historio de la akcepto kaj interplekto de kulturoj. Kiuj integriĝis ĉi tie kiel novaj familiaj membroj, kiel aliancinoj aŭ kiel forpelitoj pro timo perdi la vivon kaj petis nin akcepti ilin, tiujn ni lasis en nian landon kaj ili trovis novan hejmon. Sed kiuj venas kun la intenco ŝanĝi nian landon kaj formi nian nacion laŭ sia bildo, kiuj venis kun perforto kaj kontraŭ nia volo, tiujn trafas nia kontraŭstaro. Unue oni parolas nur pri kelkcent, mil aŭ dumil homoj, kiuj estas akceptitaj kaj integritaj. Sed neniu respondecas eŭropa gvidanto kuraĝus ĵuri, ke el tiuj kelkmil poste ne fariĝos dek- aŭ centmiloj. Se ni volas haltigi tiun popolmigradon, ni unue devos bremsi Bruselon. La plej granda danĝero por la estonteco de Eŭropo ne venas de tiuj, kiuj volas veni ĉi tien, sed de la bruselaj fanatikuloj adorantaj la internaciismon. Ni ne permesu al Bruselo, ke ĝi metu sin super la leĝoj.“

Cetere, la plimulto de komentantoj de la retpaĝo, sur kiu tiu parolado estis publikigita en la germana lingvo, entuziasme bonvenigis ĝin kaj dankis al Viktor Orbán, ke li kuraĝis diri la veron.

Ĉu do la dekstra „popolisto“ Orbán demagogie troigis, fariĝis paranoja aŭ freneza aŭ ĉu li pravas?

La 17an de oktobro Viktor Orbán estis akceptita de la bavara ĉefministro Horst Seehofer (CSU) en Munkeno, kie li klarigis la pozicion de Hungario per jenaj principaj frazoj:

„Hungario estas miljara kristana ŝtato, kiu ĉiam estis la grundo por batalantoj de la libereco. Ĝi toleras nek subpremadon nek okupacion nek diktaturon. Mi certigas vin, ke ankaŭ en estonteco Hungario staros sur la flanko de la eŭropa libereco. (...) Ni hungaroj estas sobra popolo. Ni konscias pri niaj fortoj kaj ni ne deziras superflujajn konfliktojn. Ni neniam sopiris ludi rolon en Eŭropo, kiu superus nian forton. Sed ĉiujn tridek jarojn nia tikla geografia situo puŝas Hungarion en la ĉefan fluon de aktualaj eŭropaj bataloj. Post kiam Sovetunio retiris siajn trupojn el Aŭstrio, en 1956 ni volis ŝovi la Feran Kurtenon malantaŭ nian orientan limon. En 1989 ni *devis* malfermi la limon. Kaj nun, en 2015-16, ni devas fermi la limon por haltigi la popolmigradon, kiu minacas nin el la sudo. Neniam ni petis ludi tian rolon, sed la sorto, la historio devigis nin. Ni, hungaroj, faris nur tiom por ne forkuri de la devo, sed por plenumi ĝin. Ni rezistas ankaŭ tiam, kiam ni estas atakataj de malantaŭe ankaŭ de tiuj, kiujn ni reale defendas. Mi ne neas ĝin, sed tiu maljusteco doloras nin. Sed lamentado aŭdiĝas malbone por hungaro kaj ĝi ankaŭ ne harmonias kun nia vestaĵo. Sed maljusteco ankoraŭ ne signifas liberiĝon de nia devo. (...) Mia generacio, kiu naskiĝis post 1956, ĉiam revis pri la reunuiĝo de Eŭropo. Se ĝi sukcesos, ni kredis, ke niaj infanoj kaj nepoj povos pli bone vivi ol ni. Ankaŭ ni hungaroj revis la eŭropan revon pri paco, sekureco kaj bonfarto. Pro tio post la kolapso de la diktaturoj ni opiniis nian aliĝon al Eŭropa Unio natura afero. Ni apartenas al ĝi, ni revenis hejmen, tio estas nia hejmo. Por ni estas memkompreneble, ke ni defendos ĝin, se necese. La malfermo de la limo en 1989 kaj la protektado de la limo en niaj tagoj estas du flankoj de la sama medalo. En 1989 ni servis en la intereso de la libereco de Eŭropo, kaj nun ni defendas tiun liberecon. (...) La libereco neniam estas nur memcelo. Kiel la jaro 1956 instruas, ĝi gajnas sencon tiam, kiam ni, levante nin super niaj etmensaj celoj, individuaj deziroj kaj venkante niajn timojn, kapablas agi, per aliaj vortoj: ni devas esti kuraĝaj. (...) Sed nia komuna unio forlasis la kadron de la juro. Nesolvitaj problemoj amasiĝas, kaj ni havas nur demandojn, debatojn, sed mankas komunaj respondoj. Ni ne povas atendi ĝis kiam iu ie solvos niajn problemojn. Ni devos preni la stirilon en niajn proprajn manojn. Sendepende de la ideologio aŭ politika aparteneco, ĉiu el ni povas vidi jam nun, por

povi konservi Eŭropon kaj protekti la eŭropan revon, ke ni devas ŝanĝi kelkajn aferojn. La demando estas nur, ĉu ni posedas la kuraĝon por efektiviĝi ŝanĝojn. (...) La nuna reformo ne sufiĉas kaj pli multo estas necesa. La renovigo devos veni de interne kaj ne povos veni de ekstere. Ni ne permesu, ke tiu eŭropa unueco, kiun ni konstruis per multaj rezignoj kaj dura laboro, kiun ni konstruis tra multaj generacioj, disfalos pro ideologiaj konsideroj, financaj interesoj kaj falsaj decidoj de politikistoj. (...)“

Do, Viktor Orbán, ĉefministro de Hungario, liveris la ideologian ŝtonon, kiu ligas la eventojn de 1956, 1989 kaj 2016. Per tiuj paroladoj li estis bone preparita por la 23a de oktobro, kiam li devis prezenti sian festan prelegon okaze de la 60-jara datreveno de la Hungara Ribelo de 1956. La tago venis kaj la kulminon de siaj revelaciaj halucinoj pri la maksimumoj de la libereco, pri kiu li tiom obsedas, Viktor Orbán, memelektita savanto de Eŭropo, decidis formuli laŭ jenaj vortoj kaj frazoj antaŭ la publiko, kiu venis amase por aŭskulti liajn aludojn pri la terura brusela diktaturo, komparebla kun la sovetia sistemo, sur la placo de Lajos Kossuth:

„(...) En oktobro 1956 en Budapeŝto la historio turniĝis. Anstataŭ la profetata komunisma mondrevolucio eksplodis la revolucio kontraŭ la komunisma mondo. Ni sciigis al la Okcidento, ke Sovetunio estas vundebla kaj ke en la mondo restas nur la steloj sur la preĝejaj turoj. La sovetia komunismo, kiu kredis sin neskuebla, ricevis grandan vundon, de kiu ĝi ne plu povis rekuraci sin. Post 1956 ĝi kalkiĝis kaj marasmis kune kun siaj gvidantoj, kaj kune kun ili ĝin finfine prenis la diablo. Kvankam kelkfoje li reaperis por fajfi. Neniu povas scii, de kie la hungaroj havas la forton kaj kapablon, kiu ekestas el nenio, kiel Davido kun la ŝtelo, kio okazas unufoje en ĉiu jarcento kaj apartenas al la plej grandaj mirakloj de la mondo. Eble tio estas heredaĵo de la antikvaj grekoj: la sekreto de la feliĉa vivo estas la libereco, kaj la sekreto de la libereco estas la kuraĝo. Ni hungaroj posedas la talenton por la libereco. Ĉiam ni scias kion fari kun ĝi. Ni scias, ke la libereco ne estas stato en si mem, kiun ni povas atingi, sed ekzistofomo. Ĝi estas kiel naĝado: Kiu ĉesas naĝi, tiu sinkas. Libereco ĉiam kaj ĉie estas la simpla demando: Ĉu ni mem decidus pri nia vivo aŭ iu alia? (...) Se nia patrujo ne estas libera, ni ankaŭ ne povas estas liberaj. Maksimume oni povas esti soleca, sed neniam libera. La serio de popoloj malaperintaj en la nebulo admonas nin: Se iu popolo rezignas pri sia nacieco, ĝi ĉiam povas refali al simpla minoritato. De la vorema kaj digestema apetito de imperioj povas nin savi precipe nur nia propra nacia sendependeco. Ni restis en la kolo de la sovetia imperio, kiu mordis siajn dentojn, ĉar ni konservis niajn naciajn idealojn; nin kuntenis nia amo al la patrujo, pri kiu ni ne rezignis. Ankaŭ pro tio ni ne povas akcepti, ke nia komuna hejmo, Eŭropa Unio, estu transformita al moderna imperio; ni ne volas, ke la unuiĝo de liberaj eŭropaj nacioj estu anstataŭigita per la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. La tasko de la liberamaj popoloj de Eŭropo estas eviti la sovetiigon de Eŭropo. (...) Ni hungaroj volas resti eŭropa nacio kaj ne volas esti nur eŭropa nacia minoritato. Kiel heredantoj de la porlibereca batalo de 1956 ni ne povas akcepti, ke Eŭropo forhakas tiujn radikojn, kiuj iam faris nin grandaj kaj helpis al ni postvivi la komunisman subpremadon. Ne ekzistas libera, forta Eŭropo sen la vivipovo de la nacioj kaj de la dumil jarojn maljuna saĝeco de la kristanismo. Kaj ni ankaŭ ne povas pasive rigardi, kiel senkaŝe kaj organizite oni interŝanĝas la grundon, sur kiu la eŭropa civilizo kreskis. Kaj eĉ se ni ne kapablas formi la sorton de Eŭropo, ni tamen devas porti la respondecon por nia sorto. Eĉ se Eŭropo interŝanĝas la fundamenton de sia civilizo kaj intermiksas popolojn, ni devas esti kapablaj konservi pecon de tiu Eŭropo en la grandeco de Hungario, kiu ĉiam varmigis niajn korojn kaj entuziasmigis la hungarojn.“

Kaj Orbán, la hungara novnaciisto, ripetis la kernan mesaĝon, kiun li prezentis jam en Munkeno, ke en 1989 Hungario malfermis la landlimon, por ke „la germano trovu la germanon“, kaj en 2015-16 ĝi devis fermi ĝin por bremsi la popolmigradon el la sudo kaj por eviti ĉantaĝon. Do, en tiuj historiaj momentoj Hungario plenumis nur sian devon.

Kiam dimanĉe, la 23an de oktobro, do okazis la oficiala memorakto de la 60a datreveno de la Hungara Ribelo de 1956, miloj da membroj kaj apogantoj de la Orbán-partio aperis antaŭ la parlamentejo en Budapeŝto, dum je ĝia rando okazis kontraŭ-manifestacio de kelkcent partoprenantoj de la movado Együtt, kiuj fajfis kaj montris ruĝajn kartojn kontraŭ Viktor Orbán kaj lia honora gasto, prezidento Andrzej Duda el Pollando, kiu staris kaj festparoladis sur la sama tribunulo. Pro la laŭta fajfkoncerto la parolado de Orbán estis ĝenata kaj malbone aŭdebla. La opoziciulo *Péter Juhász* estis malhelpita trapasi la barilojn de la sekureco por atingi la placon de la parlamentejo, kaj la historiisto

Krisztián Ungváry eĉ estis krude batita de iu sovaĝulo kontraŭ la vizaĝo. Opoziciaj politikistoj riproĉis al Orbán, ke li perfidis la hungaran ribelon de 1956, dum kiu la tiamaj homoj protestis ekzakte kontraŭ tiu speco de spirito, kiun li nuntempe mem reprezentas. La manifestacio de Orbán estis protektita de la privata sekureca firmao Valton Security, kio estis konsiderata de la opozicio kiel skandalo, ĉar tiaj politikaj manifestacioj kutime devus esti protektitaj de la ŝtata polico. Iu leganto de *Neue Zürcher Zeitung* skribis, ke la gazetaro draste troigis la signifon de la fajfado de la opozicio, kiu estis apenaŭ aŭdebla.

En la sama tago de la 23a de oktobro 2016 en la urbo okazis du aliaj manifestacioj de opoziciaj grupiĝoj:

Sur la Blaha Lujza-placo kunvenis la tuta maldekstra opozicio, kun elpaŝo de eksĉefministro *Ferenc Gyurcsány*, persona ĉefrivalo de Orbán, *Gyula Molnár* de la Hungara Socialisma Partio kaj *Gergely Karácsony* de alia malgranda maldekstra organizaĵo. Ĉiuj pledis por politika ŝanĝo en la jaro 2018 okaze de la venontaj parlamentaj elektoj, ĉar necesus „liberigi la landon de la partio“ de Orbán. Sed *Lajos Bokros*, iama financministro, avertis, ke probable neniu de la opoziciaj partioj sola havos la forton sukcese kontraŭstari la regantan partion „Fidesz“. Krom tio, ankaŭ la adeptoj de la ekstremdekstra partio „Jobbik“ kolektiĝis ie en la urbo, kie elpaŝis partiestro *Gábor Vona* kaj *László Toroczkai*; ĉi-lasto estas la fifama radikala urbestro de Ásotthalom kaj spirita iniciatinto de la barilmuro ĉe la hungara landmlimo. Krom trakti la temon, ke la aktoj pri János Kádár devas esti publikigitaj kaj la postulo, ke Orbán demisiu, ili ne havis multon alian por diri. Alia skandalo estis, ke László Tasnádi ricevis la rangon de general-leŭtenanto, kvankam dum la komunisma tempo li membris en la sekreta servo kaj manipulis la raportadon pri la reentombigo de Imre Nagy en 1989 en la senco de la komunismaj regantoj. Al *Janos Áder*, la praktike sensignifa, ĉar sole protokola ŝtatsprezidento, kiu estas komplete nekonata figuro en eksterlando, sed des pli lojala partiano de Orbán, pro kio li estas bojkotita de la maldekstruloj kaj de „Jobbik“, restis la tasko hisi la hungaran flagon antaŭ la parlamentejo.

Pri la tuta provo de Orbán kaj Fidesz uzurpi la datrevenon ĉagrenis ankaŭ la veteranoj de la hungara ribelo de 1956 mem. Ili opiniis, ke Orbán misuzas la (maldekstrajn!) ideojn de 1956 por sia dekstre naciisma politiko, kiu havas nenion komunan kun la spirito de 1956. La veteranoj plendis ankaŭ, ke la oficialaj amaskomunikiloj de la Orbán-reĝimo ne sufiĉe respektas la meritojn de la hungaraj ribeluloj de 1956. Kaj *Imre Mécs*, unu el tiuj veteranoj kaj prominenta eksparlamentano, kiu ĉiam luktis por homaj rajtoj kaj kontraŭ ĉiuspecaj totalismaj reĝimoj, eĉ parolis pri „giganta mensogado kaj falsado de la historio de 1956“ fare de Orbán kaj ties partio.

Sed ŝajnas, ke pri la hungara revolucio oni ĉiam mensogis. Leslie B. Bain, hungardevena ĵurnalisto en Usono, notis en sia libro pri la satelitaj ŝtatoj en orienta Eŭropo (1960) koncerne la hungaran revolucion de 1956: „Pri neniu alia okazaĵo de la lastatempa historio oni tiel multe mensogis, neniun okazaĵon oni tiel tordis kaj makulis.“ (Citita laŭ Paul Lendvai).

Okulfrapis en la ĉi-jara memorado pri la hungara ribelo de 1956, ke pri la evento verve interesiĝis ankaŭ diversaj dekstraj partioj en aliaj eŭropaj landoj: Krom Horst Seehofer el Bavario kaj Andrzej Duda el Pollando, kiuj jam estis menciitaj, siajn ´adekvatajn´ komentojn liveris ankaŭ anoj de la partio AfD en Germanio kaj Christoph Blocher, la ideologia ĉefo de la dekstre naciisma Svisa Popolpartio, kiu utiligis la eventon por alvoki malgrandajn eŭropajn landojn, ke ili nepre konservu siajn liberecon, sendependecon kaj la rajton por povi mem decidi la proprajn aferojn. Malgranda groteska nuanco estas, ke politikistoj kiel Blocher aŭ Le Pen rifuzas aparteni al Eŭropa Unio, dum tiaj kiel Orbán kaj Duda, sed ankaŭ maldekstraj „eŭroskeptikuloj“ kiel Zeman (Ĉeĥio) kaj Fico (Slovakio) tamen ŝajnas ankoraŭ preferi membrecon en ĝi, ĉar tute turni sian dorson al la brusela politiko tamen signifus tro grandan riskon.

Pri la aktuala politika sistemo de Hungario Paul Lendvai, kiu verkis gravajn librojn pri la hungara ribelo de 1956 kaj pri Hungario de Viktor Orbán, komentis, ke Hungario nuntempe estas nek klasika diktaturo nek liberalisma demokratio, sed ĝi reprezentas specifan hungaran sistemon, kiu unue estas forte ligita kun la historia konscio kaj due esence influita de la personeco de Viktor Orbán mem,

kiu ricevis tre grandan potencon. Kiel sistemo ĝi do ne estas komparebla kun la duondiktaturoj de Putin aŭ Lukaŝenko, sed pli multe kun la ŝtatoj de Miklós Horthy (1920-44) kaj János Kádár (1956-1988). Komunaj trajtoj de tiuj ŝtatformoj estas la manko de demokratia kaj plurisma kulturo, aŭtoritismaj tendencoj kaj ekstrema konservativismo, pseŭdonaciismo, ksenofobio kaj ekonomia korupto.

Oficiala hungara afiŝo de la memorjaro 2016 kun la heroino Erika Szeles en la truo de flago, kie antaŭe troviĝis la sovetia emblemo.

Raportado laŭ rusa maniero

La specialaj rilatoj de Viktor Orbán kun la rusia prezidento Vladimir Putin estis observataj en Bruselo kun malplezuro kaj konfuzo, ĉar oni ne komprenis la verajn intencojn kaj celojn de la hungara ĉefministro, kiu amike rilatas kun kruda malamiko de Eŭropo, kiu ŝajne planas restarigi la gloron kaj potencon de Ruslando laŭ malnovaj imperiaj tempoj. Ĉu Orbán celis nur iomete provoki Bruselon, aŭ ĉu lia alianco kun Moskvo havas pli seriozajn, nome ekonomian, energipolitikan signifon, el kiu la hungara premiero kaj lia bando persone celas profiti?

Kiel konate, en Ruslando la historiografio estas sisteme tordata, krude manipulata kaj baze falsata laŭ la gusto kaj bontrovo de la regantaj politikistoj. Tio ne ŝanĝiĝis ankaŭ en la postkomunisma tempo, en kiu la Kremlo provas reskribi la historion, kiu celas emfazi la propran gloron kaj malgrandigi kaj misfamigi aliajn. Tio ne estas escepto ankaŭ en la kazo de la raportado pri la hungara ribelo de oktobro 1956. En tio estas okulfrape, ke la rusa historiografio konservas malnovajn stereotipojn, kiujn ĝi miksas kun interpretoj pri pli aktualaj okazaĵoj. Tiel, en centra elsendo de la rusa ŝtata televido pri la temo, la hungara ribelo estis nomita „unua kolora“ revolucio de la historio, kun analoga aludo pri pli novaj ekzemploj de Kartvelio kaj Ukrainio. La intenco de tiu interpretado aŭ pritaksado estas implici kaj denunci laŭdirajn usonajn manipuladon kaj enmiksiĝon en tiuj landoj, kiujn Moskvo konsideras propra influa sfero. Krom tio, en la kazo de la hungara ribelo oni uzis la fifaman vorton „pogromo“, kiu estas kutime aplikata por nomi kontraŭjudajn agresojn kaj atakojn (precipe en la Ruslanda Imperio de la 19a jarcento), kvankam ĝia origina signifo ne estas antisemitisma. Laŭ malnova stereotipo, en la rusa elsendo oni klopodis prezenti la hungaran ribelon kiel „kontraŭ-revolucion de malnovaj nazioj kaj faŝistoj, kiuj ricevis bonan trejnadon en la tempo de la Tria Regno“, kiu estis instigita de Usono kaj de la Okcidento por skismigi la socialisman blokon. Estis dirite, ke el hungaraj prizonoj oni liberigis „milojn da eksaj nazioj“, kiuj aliĝis al la ribelo, kaj ke el Aŭstrio revenis al Hungario amaso da eksnaziaj sabotuloj, kiuj postmilite fuĝis al Aŭstrio. Dmitrij Kiseljov, fifama moderato de la rusa televido kaj respondeca pri la nomita elsendo (kaj pri rusa propagando ĝenerale), ne hezitis klarigi, ke „la etoso estis utiligata de okcidentaj sekretaj servoj, kiuj celis transformi la komence pacan proteston al sanga ĥaoso“, kvankam Molotov (sed estis Mikojan!) kaj Ĥruŝĉov celis trankviligi la situacion kaj fini la armean intervenon. La rusa raportisto trovis strange, ke hodiaŭ oni nomas la ribelulojn „batalantoj por libereco“ anstataŭ „kontraŭ-revoluciuloj“ kiel antaŭe laŭ sovetia maniero, ke Imre Nagy estas laŭdata kiel nacia heroo, kvankam li estis komunisto, kaj ke oni hodiaŭ volonte memoras pri János Kádár kun nostalgio, ĉar sub lia reĝimo la hungaroj siatempe fartis sufiĉe bone. Kvankam en ĉiuj tiuj klarigoj eble ekzistas malgranda porcio de vero laŭ iama sovetia kompreno, la tuta interpretado, kiu baziĝas sur la supre prezentita paradigmo, kiu validis dum la tempo de Kádár, estas absolute neakceptebla, ĉar ĝi komplete tordas la faktojn, cetere kun malica intenco. Nature, Rusio malvolonte agnoskas la fakton, ke la hungara ribelo de 1956 estis ankaŭ kontraŭ-rusa protesto. Budapeŝto akre protestis kontraŭ tiuspeca misprezento de la historiaj faktoj kaj misuzo de la terminologio, tiel ke la hungara ministerio de la eksterlandaj aferoj vokis la ruslandan ambasadoron, al kiu oni klarigis, ke Hungario neniel toleras la malrespektadon de la herooj de la ribelo de 1956, kiuj estis nomataj „blatoj“ (tarakany) en tiu elsendo. Ĉu tiu memorinda incidento damaĝis la rilatojn inter Hungario kaj Rusio ne estas konate. Ĉiukaze, la hungaroj estas bone konsilataj ne tro fidi la amikecon kun la rusoj, kiuj misuzas ĉiujn malfortojn de la kontraŭuloj kaj provas plenigi la vakuon de la nekono de la historio ĉe nuntempaj generacioj de homoj per rusa propagando. Ke la rusoj mem daŭre kredas la malnovajn sovetiajn interpretojn, montras antaŭnelonge publikigita enketo de la Levada-centro en Moskvo, kiu havigis la rezulton, ke la duono de la ruslandanoj opinias, ke la sufokado de la ribelo de 1956 en Hungario fare de la sovetiaj trupoj okazis prave kaj ĝuste. El tia

sinteno oni povas konkludi, ke la ruslandanoj eble ankoraŭ hodiaŭ povus aprobi tian intervenon, se ili devus decidi ĝin en analoga kazo, ekzemple en Ukrainio aŭ en la Baltaj Ŝtatoj. Pro tio Ruslando restos ekstreme danĝera por tiuj landoj, pri kiuj la rusoj kredas, ke ili apartenas al ĝia influa sfero.²⁴

Povas esti, ke en diversaj landoj ekzistas variaj kompreno kaj interpretoj pri certaj historiaj eventoj. Ke ankaŭ en Hungario de Orbán ekzistas reviziismaj tendencoj en la historiografio, kiuj enhavas ankaŭ ksenofobajn akcentojn, ne estas surprize, ĉar certaj (cetere komplete sensignifaj) kaj ignorindaj hungaraj historiistoj (kiel d-ino Mária Schmidt) volas ludi rolon, havi influon kaj postlasi spurojn. Akceptebla do estas nek la cinika renversa rusa interpretado de la historio nek la uzurpa ideologia klopodo de la hungara ribelo de 1956 fare de la Orbán-istoj, kiuj ne hezitas kompari Bruselon kun la sovetia sistemo kaj polemikas kontraŭ ĝi kiel imperio de la subpremado de malgrandaj popoloj (kio estas skandalo), kion EU almenaŭ ne celas esti. Per tio ankaŭ Orbán mem fariĝis politika ekstremulo, speco de pario en Eŭropo, plumpa komplico de Putin kaj similaj politikaj gvidantoj, kiuj tordas kaj manipulas la historion kaj evidente perdis la ekvilibron por objekte pritaksi la aferojn, kiujn ili misutiligas por politikaj celoj. Ĉu koncerne la rilatojn kun Rusio, Orbán, kiu devas esti konsiderata kiel danĝera dekstra demagogo, lernis la ĝustan lecionon el la hungara historio kaj el la ribelo de 1956, ne estas klare. Lia patologia paranoja malamo kontraŭ Bruselo estas troigita, kurioza kaj ridinda kaj povus alpreni eĉ pli radikalajn dimensionojn, se la hungaroj donos al li ankoraŭ pli da kvazaŭ-absoluta povo, kion ili prefere ne faru. Tio povus malbone finiĝi por Hungario, kiel montras ĝia antaŭa historio.

Utiligitaj informfontoj

Pri la hungara ribelo en 1956

Kroniko de la eventoj en 1989:

<http://www.demokratiezentrum.org/wissen/timelines/ungarn-1956.html>

Artikoloj:

<https://www.bundestag.de/blob/411922/cb47a587102fc432fda7d4e0bccdaa8c/wd-1-099-06-pdf-data.pdf>

<http://www.nzz.ch/international/europa/tragische-rebellion-gegen-die-sowjetunion-ld.123453>

<http://www.nzz.ch/international/europa/60-jahre-revolution-in-ungarn-das-schallende-echo-von-1956-ld.123525>

<http://www.nzz.ch/zuerich/ungarnaufstand-1956-die-nacht-in-der-gabor-ugron-ein-mann-wurde-ld.125283>

<https://www.sozialarchiv.ch/2016/11/11/vor-60-jahren-die-ungarnkrise-und-die-schweiz>

<http://www.swissinfo.ch/ger/die-geglueckte-integration-der-ungarischen-fluechtlinge/5488786>

<http://www.zeit.de/1957/09/der-aufstand-der-intellektuellen>

<http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-43064554.html>

<http://www.budapester.hu/2016/10/22/ungarns-oktoberrevolution>

<https://pusztaranger.wordpress.com/2014/07/03/offener-antisemitismus-bei-orbans-chefideologin-maria-schmidt>

https://eo.wikipedia.org/wiki/Hungara_revolvero_de_1956

<http://ungarn1956.zeitgeschichte-online.de>

<http://www.p-moeller.de/pungarn1.htm#pungarn3>

²⁴ Kiel la nunaj samtempoj certe memoras, ankaŭ la „oranĝa“ revolucio en Ukrainio de la 2000aj jaroj estis mis prezentata kaj misfamigata de la putinisma propagando kiel faŝisma kaj kontraŭ-rusa movado, kvankam temis unuavice pri protesto de studentoj, junularo, intelektuloj kaj homoj, kiuj protestis kontraŭ la koruptaj reĝimoj de prezidentoj Kuĉma kaj Janukoviĉ kaj volis ŝanĝojn kaj reformojn en la lando, apogante politikistojn kiel Juŝĉenko, Kliĉko, Tymoŝenko, Poroŝenko kaj aliajn opoziciulojn, kvankam enmiksiĝis ankaŭ iom pli radikalaj elementoj (kiel anoj de la movado Pora!), dum ukrainaj novnazioj ludis nur marĝenan rolon. Estas vere, ke la Okcidento apogis tiun protestan movadon per diversaj rimedoj, kio tute ne plaĉis al la Kremlo, kiu en tiu periodo jam lanĉis sian altgrade agreseman kontraŭ-okcidentan kampanjon. Do, en pluraj rilatoj la ukraina revolucio de la 2000aj jaroj povas esti komparata kun la hungara ribelo de 1956.

Unua registaro Imre Nagy

https://eo.wikipedia.org/wiki/Unua_Kabineto_Imre_Nagy

Dua registaro Imre Nagy

https://eo.wikipedia.org/wiki/Dua_Kabineto_Imre_Nagy

Tria registaro Imre Nagy

https://eo.wikipedia.org/wiki/Tria_Kabineto_Imre_Nagy

Unua registaro János Kádár (t.n. Revolucia Laborista-Kampanara Kabineto)

https://eo.wikipedia.org/wiki/Revolucia_Laborista-Kampanara_Kabineto

Dua registaro János Kádár

http://www.wikiwand.com/eo/Dua_Kabineto_Kádár

Bildoj kaj filmoj

<https://www.pinterest.com/glachance/the-hungarian-uprising-1956>

<http://cultura.hu/aktualis/oktober-23>

<http://www.nzz.ch/international/bildstrecken/bildstrecke/ungarnaufstand-1956-ungarnaufstand-vor-60-jahren-ld.122134#lg=1&slide=0>

<http://www.sueddeutsche.de/politik/ungarn-aufstand-ungarn-als-der-brutale-panzerkommunismus-sich-erstmals-zeigte-1.3213446>

http://napitortenelmiforras.blog.hu/2015/11/04/1956_szabadsagharcosai

<http://www.gettyimages.ch/detail/nachrichtenfoto/budapest-zerst%C3%B6rungen-und-sowjetische-panzer-in-der-nachrichtenfoto/542928405#budapest-zerstrungen-und-sowjetische-panzer-in-der-lli-ut-rechts-die-picture-id542928405>

<https://www.welt.de/geschichte/article158999781/Als-Ungarn-um-seine-Freiheit-kaempfte-und-verlor.html>

<https://www.welt.de/debatte/kommentare/article159175082/Ungarn-1956-Tage-des-Aufstands-Tage-der-Angst.html>

<http://www.mitbestenempfehlungen.com/echt-lassig-echt-lessing>

<http://austria-forum.org/af/Wissenssammlungen/Essays/Geschichte/Ungarn-Aufstand>

http://austria-forum.org/af/Bilder_und_Videos/Historische_Bilder_IMAGNO/FI%C3%BCchtlinge/00472289

http://austria-forum.org/af/Bilder_und_Videos/Historische_Bilder_IMAGNO/Nickelsdorf/00511806

<http://www.ooezeitgeschichte.at/Zeitgeschichte/Ungarn1956.html>

<http://www.hirado.hu/2016/10/23/veszekedessel-es-villanykapcsolgatassal-indult-de-racafolt-a-borus-vilagkepre>

<http://orf.at/stories/2292457/2292454>

(Pliajn bildojn trovu en Google sub „Ungarn Flüchtlinge 1956“)

Report of the U.N. Special Committee on Hungary, June 20, 1957; Discussion of the Hungarian Question at the Reconvened Eleventh Session of the U.N. General Assembly, september 1957

<https://history.state.gov/historicaldocuments/frus1955-57v25/ch11>

<http://mek.oszk.hu/01200/01274/01274.pdf>

<https://libcom.org/history/united-nations-report-hungarian-uprising-1956>

Germanlingve: Was in Ungarn geschah. Der Untersuchungsbericht der Vereinten Nationen. (Herder-Bücherei Nr. 9). Freiburg 1957.

Bojkoto de la Olimpikaj Ludoj en 1956

<http://www.nzz.ch/articleEN00L-1.77495>

La historio de Imre Mècs

<http://www.spiegel.de/einestages/volksaufstand-in-ungarn-1956-jungs-ich-gehe-in-den-tod-a-1117277.html>

Hungaraj rifuĝintoj en 1956

<http://www.nzz.ch/schweiz/ungarnaufstand-1956-wie-die-schweizer-ungarnfluechtlinge-aufnahmen-ld.123404>

<http://www.nzz.ch/international/60-jahre-revolution-in-ungarn-die-tellen-aus-dem-osten-ld.123522>

<http://www.nzz.ch/articleEJXOB-1.68961>

Pliaj artikoloj pri la hungara ribelo de 1956

<http://www.e-periodica.ch/digbib/view?pid=smh-002:1976-1977:56::652#652>

<http://www.e-periodica.ch/digbib/view?pid=smh-002:1998:78::488#488>
<http://www.e-periodica.ch/digbib/view?pid=smh-002:2006:86::110#110>
<http://www.e-periodica.ch/digbib/view?pid=rör-001:1958:37::207#207>
<http://www.e-periodica.ch/digbib/view?pid=rör-001:1958:37::245#245>
<http://www.e-periodica.ch/digbib/view?pid=rör-001:1958:37::271#271>

Memoroj de György Konrád pri la hungara ribelo de 1956, verkitaj okaze de la 50a datreveno en 2006 kaj publikigitaj en Pester Lloyd

<http://www.pestlloyd.net/html/2006konraderinnerungenan1956.html>

Libro de Paul Lendvai pri la hungara ribelo de 1956

<https://www.perlentaucher.de/buch/paul-lendvai/der-ungarnaufstand-1956.html>

<http://derstandard.at/2000046072857/Ungarn-1956-Eine-historische-Niederlage-die-eigentlich-ein-Sieg-war>

Libro de János M. Rainer pri Imre Nagy

<https://www.perlentaucher.de/buch/janos-m-rainer/imre-nagy-vom-parteisoldaten-zum-maertyrer-des-ungarischen-volksaufstandes.html>

Libro de Michael Gehler pri la hungara ribelo de 1956

<http://derstandard.at/2000046067071/Michael-Gehler-Der-Aufstand-war-ein-moralischer-Sieg-der-Freiheit>

Libro „The Reluctant Satellites“ de Leslie B. Bain (1960)

<https://archive.org/details/reluctantsatelli007426mbp>

Kroniko de la eventoj en 1989

http://www.budapest.diplo.de/Vertretung/budapest/de/07_25J/1-Chronik.html

<https://www.welt.de/politik/article4005815/Die-inszenierte-Zerstoerung-des-Eisernen-Vorhangs.html>

Intervjuo kun Zoltán Balog

<http://www.srf.ch/sendungen/tagesgesprach/zoltan-balog-zur-ungarischen-fluechtlingspolitik>

<http://www.kormany.hu/en/ministry-of-human-resources/the-minister>

Intervjuo kun Imre Pozsgay

http://www.zzf-pdm.de/Portals/_Rainbow/images/publikationen/Hertle_30.pdf

Raportado pri la okazaĵoj de la 23a de oktobro 2016 en Budapeŝto

<http://derstandard.at/2000046101261/Ungarn-Revolutionsgedenken-ohne-gemeinsame-Basis>

<http://www.nzz.ch/newsticker/gedenkfeier-zum-ungarn-aufstand-pfiffe-gegen-orban-ld.123661>

<http://www.srf.ch/news/international/gedenken-an-ungarn-aufstand-orban-erntet-pfiffe-und-haeme>

<http://diepresse.com/home/politik/aussenpolitik/5107017/Pfeifkonzert-fur-Orban-bei-VolksaufstandGedenkfeier>

<http://www.budapester.hu/2016/10/27/ubergriffe-waehrend-der-gedenkfeier> (detale)

<http://jungle-world.com/artikel/2016/44/55114.html>

Festparolado de Viktor Orbán en Budapeŝto (23a de oktobro 2016)

<http://www.spiegel.de/politik/ausland/ungarn-orban-warnt-vor-sowjetisierung-europas-a-1117918.html>

<http://www.miniszterelnok.hu/orban-viktor-unnepi-beszede-az-1956-os-forradalom-60-evfordulojan> (teksto hung.)

<http://www.miniszterelnok.hu/prime-minister-viktor-orbans-speech-at-the-official-ceremony-marking-the-60th-anniversary-of-the-1956-revolution> (ksto teksto engl.)

<http://www.miniszterelnok.hu/viktor-orbans-festrede-2> (germ.)

<http://www.kormany.hu/hu/a-miniszterelnok/hirek/oktober-23-a-buszkeseg-napja> (hung.)

<http://www.kormany.hu/en/the-prime-minister/news/we-must-save-brussels-from-sovietisation> (angl.)

Memortago en 2016 en Svislando kaj la rolo de Christoph Blocher

<http://www.tagesanzeiger.ch/schweiz/standard/ein-gedenken-das-einen-sollte/story/29833332>

<http://www.blocher.ch/artikel/single/article/referat-anlaesslich-des-60-jahrestages-der-ungarischen-revolution-und-des-freiheitskampfes-von-1956>

Festparolado de Viktor Orbán en Budapeŝto (15a de marto 2016)

<http://www.freiewelt.net/blog/viktor-orbans-rede-zum-ungarischen-nationalfeiertag-am-15-maerz-2016-10065970>

Festparolado de Viktor Orbán en Munkeno (17a de oktobro 2016)

<http://www.miniszterelnok.hu/viktor-orbans-festrede>

Intervjuo kun Neue Passauer Zeitung

<http://www.kormany.hu/en/the-prime-minister/the-prime-minister-s-speeches/interview-der-deutschen-passauer-neuen-presse-mit-viktor-orban>

Festparolado de Viktor Orbán en Budapeŝto (15a de marto 2016)

<http://www.freiewelt.net/blog/viktor-orbans-rede-zum-ungarischen-nationalfeiertag-am-15-maerz-2016-10065970>

Pri la hungara referendumo de la 2a de oktobro 2016

<http://www.nzz.ch/international/europa/ungarn-referendum-zu-hoch-gepokert-ld.120129>

<http://www.nzz.ch/meinung/orban-nach-dem-referendum-in-ungarn-die-fatale-lust-an-der-polarisierung-ld.119982>

Pri la prezo de restadpermeso en Hungario

<http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/europa/fluechtlinge-in-ungarn-der-aufenthaltstitel-kostet-360-000-euro-14483344.html>

Pri la rilatoj de Viktor Orbán kun Vladimir Putin

<https://www.tagesschau.de/ausland/orban-putin-101.html>

Artikoloj de *Budapester Zeitung* pri la krizo de rifugintoj

<https://www.budapester.hu/2016/10/06/politisch-gultiges-eigentor>

<http://www.budapester.hu/2016/09/24/im-falschen-film>

<https://www.budapester.hu/2016/09/19/warum-gutmenschen-mit-dem-feuer-spielen>

<http://www.budapester.hu/2016/05/28/das-verwaiste-vermachtnis>

Reviziismaj kaj antisemitismaj tendencoj en la historiografia interpretadode „Fidesz“

<https://www.freitag.de/autoren/der-freitag/mit-atenschutz-im-parlament>

<https://pusztaranger.wordpress.com/2014/07/03/offener-antisemitismus-bei-orbans-chefideologin-maria-schmidt/>

Pri János Áder

<http://www.spiegel.de/politik/ausland/ungarn-janos-ader-ist-der-neue-praesident-a-830923.html>

https://de.wikipedia.org/wiki/János_Áder

Raportado laŭ rusa maniero

<http://www.spiegel.de/politik/ausland/ungarn-bestellt-russischen-botschafter-ein-streit-ueber-wort-pogrom-a-1118258.html>

<http://www.vesti.ru/doc.html?id=2814429>

<http://www.vesti.ru/doc.html?id=2813445>

<http://www.rbc.ru/politics/25/10/2016/580f7b5b9a7947e14ec2d7fa>

Libro de Paul Lendvai pri Hungario de Orbán:

<https://kurier.at/politik/ausland/orbans-ungarn-ein-sittenbild/224.701.090>

<http://derstandard.at/2000045548028/Ungarns-Fuehrerdemokratie-und-ihre-Folgen>

<http://www.kleinezeitung.at/politik/aussenpolitik/5101372/Livestream-zum-Nachschauen-Paul-Lendvai-Orban-ist-der-einzige>

<http://www.sueddeutsche.de/politik/viktor-orbn-so-verwandelte-orbn-ungarn-in-eine-fuehrerdemokratie-1.3216338>

<http://www.kremayr-scheriau.at/assets/buxmedia/9dd61f23640533e4d54484a60242fafd.pdf>

vd. ankaŭ Google Books

Aktuala artikolo de Paul Lendvai pri Viktor Orbán (*Der Bund/Tages-Anzeiger*, 29.12.2016)

<http://www.derbund.ch/ausland/europa/Orban-ist-der-totale-Zyniker/story/10274858>

Kiel Hungario traktas rifuĝintojn ĉe la landlimo (2016)

<http://daserste.ndr.de/panorama/archiv/2016/Blutige-Grenze-Wie-die-EU-bei-Ungarn-wegsieht,ungarn604.html>

<http://www.oe24.at/welt/So-brutal-trickst-Ungarn-Fluechtlinge-aus/261158749>

© En Esperanto originale verkita de Andreas Künzli, Svislando, publikigita en decembro 2016 sur www.planlingvoj.ch.

La aŭtoro (lic. phil. / M.A.), nask. en 1962 en Lucerno (Svislando), studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la universitato de Zuriko en 1983-91, kun profundaj studoj pri tiuj fakoj ankaŭ poste. Hungarion li plurfoje vizitis en la 1980aj jaroj.

Pri la uzitaj bildoj, ilia eventuala kopirajto ne estas konata al mi, kaj mi utiligis ilin en la kredo, ke eblas libere reutiligi ilin. This is a non-commercial projet for educational purposes, such as teaching, scholarship and research. In case of problems with copyright, please contact the author.